der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

24. Jahrgang Nr. 149 (3/1988) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Pri rezultoj de la jubilea jaro

Laŭ la kalendaro ĝi finiĝis, la jubilea jaro de Esperanto. Tamen, ĉar ankoraŭ daŭras multaj aktivecoj ligitaj al la 100-jariĝo de Esperanto, la Estraro de UEA decidis oficiale fermi la jubileon dum la 73-a Universala Kongreso en Rotterdam. Tamen, jam nun oni povas resumi la plej gravajn atingojn de tiu jubileo, internacie kaj en DDR.

1. La jubileo fakte enkondukiĝis per la jam fama rezolucio de UNESKO 23c/Res. 11. 11., kiun ni publikigis 4-lingve en „der esperantist" 136 [2/86]. Ĉi tiu rezolucio grave altigis la reputacion de Esperanto kaj en multaj landoj ebligis oficialajn kontaktojn al la UNESKO-Komisionoj, kie ili antaŭe mankis.
2. La jubileo en multaj landoj ebligis atentigi pri tiu fenomeno, ke ja ekzistas, funkcias kaj avoluas Esperanto, kvankam skeptikuloj aŭ neinformitoj ne laciĝas aserti la kontraŭon. Post 100 jaroj ne plu temas pri eventuala sukceso, aŭ eksperimento ne klara. Temas pri faktoj, pruveblaj kaj konstateblaj.
3. La amasmedioj en multaj landoj donis atenton al Esperanto ĝis nun nespertitan.
4. La multaj kongresoj, aparte en Pollando, sed ankaŭ en Francio (SAT-Kongreso en Boulogne-sur-Mer) kaj Aŭstrio (Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco) estis gravaj kaj dignaj jubileaj aranĝoj. Elstaras la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, la plej impona kongreso en la historio de Esperanto kaj sendube la plej multnombra unulingva internacia kongreso en la historio de la homaro.
5. Dum la kongreso en Varsovio la prezidanto de la pola parlamento, Roman Malinowski prezentis ege interesan proponon:
   Konstrui en la naskiĝurbo de L. L. Zamenhof internacian centron de la Esperanto-kulturo (kp. „der esperantist", 145[5/87], p. 102—103). Oni jam fondis internacian konsilantaron, havis kelkajn renkontiĝojn kun Malinowski kaj prezentis konkurson por arkitektoj pri la plej konvena konstruaĵo. La centro konsistos el kelkaj domoj, kiuj estos konstruataj dum 10 jaroj paŝon post paŝo.
6. De aparta graveco estis la komuna seminario inter la Monda Packonsilantaro, UEA, MEM kaj TEJO, fine de oktobro en Helsinki. Ni publikigis la finan dokumenton en de 2/88.
7. La fakto, ke pere de la jubileo oni povis atentigi pri la 100-jara planlingvo, certe ankaŭ plifaciligis la enkadrigon de konvenaj prelegoj en la programon de internaciaj kongresoj. Ekzemplo por tio estas sendube la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj, okazinta dum aŭgusto 1987 en Berlin. Ni publikigis pri la rezultoj artikolon en „der esperantist" 146(6/87).
8. Kelkaj landoj eldonis poŝtmarkojn tiel oficiale atentigante pri Esperanto.

9. Eblas mencii multajn aliajn formojn de publika atentigo pri la jubileo: ekspozicioj, festlibroj, prelegoj, sciencaj studoj k. s.

Tamen — ni ne forgesu, ke jubileoj pasas. Ke pludaŭru la jubileaj impulsoj, dependas de la pli saĝa, pli celkonscia kaj pli sistema laboro de la esperantistoj mem.

Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA

1988 daŭrigu la atingojn de elstara 1987

Kiel ajn oni konsideras, la jaro 1987 estis elstara jaro por Esperanto. Tra la tuta mondo, ene de lokaj grupoj kaj landaj asocioj oni digne festis la centjariĝon per specialaj publikaj kunvenoj, jubileaj kongresoj, eldonaĵoj kaj, plej grave, informa laboro. La kvanto de artikoloj pri Esperanto, kiuj aperis tra la mondo, estis senprecedence alta, kaj la atento, kiun ĝi ricevis ĉe la publiko kaj la formantoj de la publika opinio estis pozitiva kaj impona. La historio de la Jubileo vere komenciĝis en 1985, kiam la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion favoran al Esperanto, precipe dank' al la energia laboro de nia kolego Tibor Sekelj. Ĝi iasence kulminis en Varsovio en julio, kiam sesmil homoj el ĉiuj mondpartoj kolektiĝis en la plej granda kunveno de parolantoj de Esperanto en la tuta historio de la lingvo.

La laboro daŭras. Dum la venontaj monatoj aperos ĉe UEA tuta lavango da eldonaĵoj. Okazos la unua kunsido de la organiza komitato de la Centro Zamenhof en Bjalistoko. En pluraj landoj oni planas agadojn ligitajn al la Jubileo, kiuj tamen okazos en la venontaj monatoj. Efektive, oni devas atenti, ke la jaro 1988 ne estu jaro de ripozo, ke la granda rapidiĝo kaj intensiĝo de nia agado en 1987 reprezentu ne izolitan kulminon, sed novan ŝtupon en nia progreso.

La Estraro de UEA aŭdinte raportojn pri la imponaj sukcesoj kunlige kun la Jubileo en 1987, lastatempe decidis formale fermi la Jubileon per speciala ceremonio dum la Universala Kongreso en Roterdamo. Intertempe UEA daŭrigos la jubilean agadon — tiel ke nia jubilea periodo daŭros ĝis la oficiala fermo en julio. Ni alvokas al ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj, daŭrigi la Laboron, kaj eĉ plani novajn agadojn, por la Jubileo 1987-88.

Mi kredas, ke mi esprimas la dankemon de ĉiuj niaj kolegoj se mi kvazaŭ formale dankas tiujn, kiuj per tiel granda fortostreĉo progresigis nian movadon en 1987. La jaro 1988 estu jaro de daŭrigo kaj de novaj atingoj. La jubileo pluprogresu.

Ĉefaj rezultoj de la jubilea jaro en GDR

La centjariĝo de Esperanto alportis kelkajn ŝancojn al la Esperanto-movado, atentigi pri la rezultoj de la internacia lingvo kaj impulsi la pluan evoluon. Tiujn ŝancojn ankaŭ utiligis GDREA. Kun kiu rezulto? Ni resumu nur la ĉefajn:

1. Tre bela malfermo de la jubilea jaro por GDREA estis la ricevo de komplete nova oficejo kun 6 ĉambroj, 4 koridoroj, banĉambro kaj kuirejo. Tiu oficejo donas tute novajn eblecojn al la multflanka agado de la asocio.
2. Sed Kulturligo ne nur disponigis novan oficejon, tiel aprezante kaj valortaksante la agadon de la esperantistoj. Finfine ankaŭ aperis la ebleco, dungi duan kunlaboranton, kiu helpu al la sekretario de GDREA realigi la daŭre plimultiĝantajn taskojn. Bedaŭrinde la konvena homo ankoraŭ ne troviĝis.
3. Aparte grava estis la nove noditaj ligoj al la UNESKO-Komsiono de GDR. Surbaze de la rezolucio de UNESKO pri Esperanto, la komisiono efike subtenis GDREA. La membro de la prezidio de la komisiono, d-ro Helmut Tautz, prelegis (en Esperanto!) kadre de la solena jubilea aranĝo de GDR, dum marto en Leipzig. Ĝi estis aparte sukcesa Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo kun la te-

mo „Cent jaroj de Esperanto — lingvo de popola interkomprenigo". Sed daŭras la kontaktoj. D-ro Tautz ankaŭ prelegis kadre de IFER '88 („La homo kaj la scienc-teknika revolucio"). Krome la sekretario de GDREA havis la eblecon, prelegi antaŭ la sekcio Kulturo de la GDR-UNESKO-Komisiono. Plua prelego estas planita.
La UNESKO-Komisiono de GDR sendis raporton al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO pri la plenumo de la rezolucio en GDR. Dum la 24-a ĝenerala asembleo de UNESKO en Parizo, la 16-an de novembro 1987 d-ro Tautz akceptis d-ron Blanke kaj francajn esperantistojn en la UNESKO-domo de Parizo kaj donis valorajn konsilojn por plua agado.

4. La centra jubilea festarangxo estis IFER '87, pri kiu ni raportis en „der esperantist" n-ro 143(3/87). Kelkaj internaciaj kaj naciaj Esperanto-revuoj raportis pri tiu grava arangxo. Sed ankaŭ diversaj distriktaj organizajoj havis siajn apartajn jubileajn aranŭĝojn. Aparte menciinda estas la junulara arta semajno de 25. 2. — 2. 3. 87 en Halle.
5. Tre efika dum la jubilea jaro estis la gazetara agado. En la gazetoj kaj revuoj de GDR aperis kelkcentoj da artikoloj, inter ili amplekaj prezentoj pri Esperanto en la plej gravaj jurnaloj, ekz. „Neues Deutschland", „Berliner Zeitung", „Wochenpost", „Horizont", „Urania", „Tribüne" kaj aliaj. Estas rimarkinde, ke ofte la jurnalistoj mem venis al GDREA kaj petis informojn aŭ intervjuojn. Kelkaj distriktaj estraroj organizis apartajn gazetarajn konferencojn. (ekz. Schwerin, Leipzig).
6. La kontribuoj en la televido estis certe rimarkeblaj: la aparta programo en la „kulturmagazino" estis dufoje dissendita. 3-foje la Aktuala Kamerao raportis pri IFER '87 kaj 2-foje la televido prezentis mallongan filmraporton pri la 72-a Universala Kongreso. Cetere, jam en 1986 la televido dissendis bonan filmraporton pri la kongreso en Pekino. 1988 IFER denove ludis rolon en la Aktuala Kamerao.
7. Ankaŭ ne mankis radiointervjuoj. La centraj stacioj, emisiis eble 10 — 15 intervjuojn, krome 30-minutan radioscenajon „La revo de doktoro Zamenhof" (GDR-a radiostacio), kaj du du-horajn rektajn disaŭdigojn kun multege da informoj kaj Esperantaj kanzonoj. [Radio GDR] Aldoniĝas multaj radiointervjuoj sur distrikta ebeno (ekz. Schwerin, Rostock, Neubrandenburg, Potsdam, Magdeburg, Erfurt. Frankfurt/O., Leipzig, Halle).
8. En multaj urboj ekspozicioj konvene atentigis pri Esperanto. Al ili apartenas ekspozicioj en universitataj bibliotekoj (Halle, Leipzig, Dresden), urbaj bibliotekoj (Berlin, Rostock), en la domoj de instruistoj (Magdeburg), kadre de kulturligaj arangxoj, gazetaraj festoj, en vitrinoj k. s., sume verŝajne pli ol 40 ekspozicioj. La esperantistoj ankaŭ utiligis la gazetarajn festojn (ekz. en Rostock, Leipzig) por arangxi ekspoziciojn.
9. Ne mankis aparte menditaj prelegoj pri Esperanto, ekzemple en universitatoj kaj altlernejoj (Zittau, Rostock, Dresden) kadre de la sciencpopulariga organizajo „Urania" (Berlin, Dresden), antaŭ laborkolektivoj, antaŭ funkciuloj de Kulturligo, Germana Libera Junularo (FDJ), Societo de Germana-Sovetia Amikeco (DSF) kaj aliaj.
10. Fondiĝis novaj grupoj. Aliĝis novaj membroj al GDREA, tiel, ke la asocio en 1987 atingis preskaŭ 2 000 membrojn.
11. Tre grava pliboniĝo okazis en la kampo de priesperanta informado pere de germanlingvaj informiloj. En Halle ekeldoniĝis nova modest-aspekta sed tre utila periodajo, „die rationelle Sprache" (la racia lingvo), aperanta 6-foje jare, 8-paĝa. destinita por la neesperantista publiko. Ĉe GDREA aperis moderna 4-paĝa informilo (grafike arangxis Joachim Schulze), en 10 000 ekzempleroj. Aperis ekstra

numero de „der esperantist", 24-paĝa, komplete en la germana kun 14 artikoloj pri Esperanto. Ĉi tiu materialo kaj la broŝuro „Esperanto und Wissenschaft" formas multflankan diferencite uzeblan materialon por trafa informado.

12. En Wehlen, ĉe Dresden, estis inaŭgurita memortabulo pri L. L. Zamenhof.
13. Unuan fojon en la historio de GDR aperis poŝtmarko pri Esperanto.
14. Laŭ rekomendo de la Ministerio pri Altlernejoj kaj Faklernejoj el la jaro 1987 oni povas proponi fakultativajn Esperanto-kursojn, se ekzistas konvenaj lektoroj. Jam funkcias 4 kursoj. Pluraj estas preparataj.
15. Por ebligi pli sisteman sciencan traktadon de interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj en GDR, la 1-an de februaro 1988 la ministro pri Altlernejoj kaj Faklernejoj nomumis d-ron sc. Detlev Blanke „Honoraria docento pri interlingvistiko ĉe Humboldt-Universitato de Berlin". Tiu evento, la Esperanto-kursoj en altlernejoj kaj la sukcesa partopreno de interlingvistoj en la kadro de la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj dum aŭgusto 1987 en Berlin, elokvente montras la plialtiĝintan reputacion, kiun Esperanto havas en sciencistaj rondoj de GDR.
16. Ne laste ni menciu la relative amasan partoprenon de GDR-esperantistoj en la jubileaj 72-a kongreso (130) kaj junulara kongreso (50) en Pollando.

Kaj oni povus aldoni multajn aliajn faktojn.
Do — ĝenerale dirite, la klimato por efika esperantista agado en GDR konsiderinde pliboniĝis. Tio ne venis aŭtomate, el si mem. Necesis multega laboro.
Sed ni ne ripozu sur niaj laŭroj. Kio valoras, estas la daŭroj ...

D. B.

La Scienc-Teknika Komisiono (STK) komunikas

1. Daŭrigo kaj revigliĝo

En aŭgusto 1987 forpasis, post grava malsano, la longjara prezidanto kaj aktivulo de STK en GDREA, nia amiko kaj diligenta laborinto, kolego Richard Partecke. Li estis transdoninta la stafeton al kolego Michael Behr, kiu dum la lasta duonjaro klopodis starigi koncepton pri la daŭrigo kaj revigligo de la laboro, komune kun la aktivuloj el la fakrondoj kaj kun CE de GDREA. Post intensiva interŝanĝo de opinioj kaj proponoj nun estiĝis laborplano de STK sube publikigita.

2. La estraro de STK en GDREA

La estraro konsistas el
— prezidanto: Michael Behr, Koburger Straße 83, Markkleeberg, 7113.
— reprezentanto de TEC: Wera Blanke, Otto-Nagel-Straße 110, PF 1113-05, Berlin, 1141.
— po unu reprezentanto el la ekzistantaj fakrondoj (Medicinista, Forstista, Fervojista, Komputista, Poŝtista kaj aliaj fondotaj)

3. La organo de STK en GDREA

La organo estas la „STK-Informilo", ne regule aperanta kaj senpage abonebla ĉe la adreso de la prezidanto. La „STK-Informilo" servu al la publikigo de
— principaj dokumentoj (laborplanoj, deklaroj de TEC, ktp.),
— anoncoj de aranĝoj, de kontaktserĉantoj, ktp.,
— raportoj pri aranĝoj, laboreblecoj, faritaj kaj farataj laboroj.

4. Sinanoncoj de interesiĝantoj

Interesiĝantoj pri la uzo de Esperanto
— en faka laboro, aŭ
— en la esplorantaj aŭ aplikantaj naturSciencoj aŭ teknikoj,
kaj speciale esperantistoj k o m p r e n a n t a j la neceson okupi la vakajn lokojn en la laborplano (mendebla ĉe la prezidanto de STK), skribu al la adreso de la prezidanto kaj donu minimume la jenajn informojn:
nomo, antaŭnomo, akademia grado (se estas), naskiĝdato, adreso, lernita/studita profesio, profesia agado, profesia gvidfunkcio, interesiĝo pri kiu

fako, preteco pri kunlaboro (jes/ne), preteco pri gvida laboro (jes/ne), abonitaj jurnaloj.

Michael Behr

ESPAROL

En la Budapeŝta Teknika Universitato esploristoj ellaboris la aŭtomatan sintezon de Esperanto. La sistemo ESPAROL povas eldiri kun konvena intonacio ĉiujn Esperantajn tekstojn skribitajn laŭ la normala ortografio: ĝi prononcas ankaŭ numerojn kaj aliajn specialajn karakterojn troviĝantajn sur la klavaro (=, +, ÷, ktp.).
Per simpla programo en la programlingvo BASIC oni povas voĉigi pli longajn tekstojn ankaŭ kun variabloj; paroligi la maŝinon diversrapide, flustre aŭ raŭke, eĉ eblas enprogrami kantojn.
La sistemo konsistas el aparato konektebla al mikrokomputilo Commodore '64 aŭ '128 kaj el programo sur disketo. La varianto por IBM persona komputilo kaj al ĝi kongruaj estas evoluigata. Laŭ nia scio ESPAROL estas la unua parolsinteza produkto por vaste uzataj mikrokomputiloj.
La sistemon eblas konekti kun optika legilo ellaborita en la hungara komputika esplorinstituto SZKI. Tiel malbone vidantaj aŭ okupitaj homoj povas aŭskulti komputile laŭtlegitajn tekstojn.
La evoluigantoj de ESPAROL, Ilona Koutny, d-ro Gábor Olaszy kaj d-ro László Czapp laboras nun pri aplikoj kun studentoj. Pretiĝas instruado. Ĝi povas servi ankaŭ en la provlegado de komputile kompostitaj tekstoj.
Ĉiu uzanto mem povas fari simplajn Basic programojn por utiligi la parolkapab'on laŭ siaj deziroj.
Pluaj informoj ĉe I. Koutny (Budapeŝta teknika Universitato, Budapest, Stoczek u. 2., H-1111).

Esperanto-fako pluiras en la Budapeŝta Universitato

Jam multaj scias, ke la 21-an de aŭgusto 1987 pro grava malsano mortis prof. d-ro István Szerdahelyi, universitata docento, gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.
Post aŭgusto la sorto de la fako estis duba, sed per lastmomenta decido la instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du eksstudentinoj, liaj kunlaborintinoj: Ilona Koutny kaj d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits.
La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato kaj kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas krom la lingvoinstruado, priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe krom la 13 tagaj studentoj ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas 3-jaran studprogramon. Tie la posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca studenta rondo — temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko, kaj ekde nun sub la gvido de Ilona Koutny ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo Opus Nigrum, redaktata de István Ertl (ankaŭ redaktoro de IPR).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la Universitato; 1. Studentoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; 2. Hungaroj, loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; 3. ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bv. turniĝi al Esperanto-fako, ELTE, Budapest, Pf. 107. H-1363, Hungario.

Laste aperis

— Edinburgh prelegoj pri mensa scienco, La, Thomas Troward. El la angla trad. E. C. Pollock. Morongo Valo: la tradukinto, 1985. 100 p. 28 cm. ISBN 0 930704 20 7. Serio de 16 prelegoj pri la menso kaj ties ecoj kaj kapabloj.

— Flugilhava ŝtono (1973), Jiři Karen (1920). El la ĉeha trad. Jiři Kořinek. Chapecó: Fonto, 1985. 238 p. Ilus. 21 cm. Fonto-serio 5. Kolekto de la ĉeha kaj Esperanta poeto, kun i. a. tri el liaj kompletaj poemaroj.

— Kulturo kaj internacia lingvo, William Auld (1924). Chapecó: Fonto, 1986. 120 p. 21 cm. Fonto-serio 10. Dek eseoj de nia konata aŭtoro pri diversaj lingvaj kaj movadaj temoj.

— Listo de la Volapük-asocioj kaj kluboj, Johann Schmidt (1895 — 1977). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 14 p. 30 cm. Jubilea Eldonserio 4; Interlingvistiko 4. Dulingva: Esperanto-germana. Kompilita laŭ postlasaĵoj de Johann Martin Schleyer (1831 — 1912); kun postparolo de R. Haupenthal.

— Loĝkulturo, Stjepan Planić (1900 — 1980). El la serbokroata trad. Lucija Borĉić. Osijek: Revija, 1985. 52 p. Ilus. 24 cm. Bind. ISBN 86 7209 024 1. Verko de grava arkitekto, destinata ĉefe por infanoj, pri homdignaj loĝejoj.

— Memuaro pri flamoj, Yamamoto Nobuko. El la angla trad. Esperanten Janet Bixby; japanen trad. Ono Eiko. Komp. Umeda Setuko. Niiza (Japanio): Stelidoj, 1985. 14 + 13 + 9 p. 26 cm. Trilingva: angla, Esperanta, japana. Rakonto de japandevena usonanino, kiu spertis la faligon de la atombombo sur Hirošimon.

Verdula regreso

El la „Asocio de Verduloj Esperantistaj" (AVE) de FRG venas nekompreneblaj pafoj kontraŭ la „Monda Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof", kiun oni intencas konstrui en Bjalistoko, Pollando. Por memorigi: Dum la Jubilea Kongreso varsovia la plej alta protektanto de tiu aranĝo, nome la prezidanto de la pola parlamento, proponis krei tiun centron en la naskiĝurbo de Zamenhof.

Kion la verduloj kontraŭas? Mi citas laŭvorte el artikolo, aperigita en „Esperanto aktuell", n-ro 7-87, kelkajn partojn:

1-e: „... MEC (Monda Esperanto-Centro) estas pli multe produkto de troa ĝenerala sentimentala centjariĝa entuziasmo ol de racia kaj detalema prijuĝado. Ĝi fakte estas regreso programita ..."

2-e: „La nova konstruaĵo foruzas kelkajn hektarojn da grundo, t.e. plensigelas la teron ..."

3-e: „La onta centro certe laboros laŭ la pola juro. Tio signifos kontrolon de cenzuristoj komunistaj ..."

4-e: „La centro signifas malŝparon de rimedoj ... Ĉiukaze: jen disigo kaj disipo de fortoj: regreso!"

5-e: „... timon pri la fakto, ke la Esperantistmo efektive restas en la postondoj de tiuj aĉaj politikaĵoj, kiujn ni ĉiuj sur nacia nivelo tre bone konas!"

Mi, leginte tiujn liniojn, ne povis bridi min kaj devis tajpi mian kontraŭdiron en mian skribmaŝinon. Toleremo, ĉiam diklitere skribite sur la verdulaj flagoj, ja ne estas sentebla en kaj inter la linioj ĉi-supre cititaj. Mi ne volas maltolereme pritrakti la citaĵojn, sed provi resti objektiva. Do, punkto post punkto!

Pri 1-e: Mi persone tute ne estas sentimentala esperantisto kaj eĉ kontraŭas akre la troigitan verdecon de granda parto de la esperantistaro. Mi racie kaj detaleme prijuĝas la ideon de la pola politikisto taŭga kaj la centron bezonata. Kie oni povus trovi pli konvenan lokon por tiu konstruaĵo ol en urbo strikte ligita al Esperanto? En tiu fakto mi vere ne povas ekvidi regreson.

Pri 2-e: Certe la nova konstruaĵo ne povos esti konstruata iel en la aeron. Tion eĉ ne povas verduloj, kiel montras informo en la sama numero de „Esperanto aktuell" kaj de la sama aŭtoro. Tie li/ŝi raportas pri t.n. „mondhejmo", pri „Internacia Ekologia Centro", fondota en Cauduro en Sudfrancio. Laŭdindaĵo! Sed mi citas: „La rekonstruado de tri ruinoj sur tereno de ĉ. 3000 m^2 ... komenciĝos en printempo de 1988". Se mi konsekvence sekvus la skribint(in)on de tiuj informoj, tiam oni devus forigi la ruinojn kaj redoni la grundon al la naturo! Ne, inter la linioj mi sentas, ke tiu postulo nur koncernas la polan Esperanto-Centron — franca centro ja troviĝos sur kapi-

talista (do: ege libera!) grundo! Kia diferenco al socialisma!

Pri 3-e: La Monda Esperanto-Centro tutcerte laboros laŭ pola juro, same kiel la verdula mondhejmo laboros laŭ franca juro! La centroj ja ne troviĝas ekster spaco kaj tempo, kaj Esperantio ja ne ekzistas kiel ŝtato kun propraj leĝoj. Restas la ridinda timo pri „cenzuristoj komunistaj". Tio min memorigas pri tempo, kiam oni skizis la komunistojn kun tranĉilo inter la dentoj. Mi kredis min preter tiu tempo — nun ĝuste verdulo reportis ĝin al mia menso. Laŭ miaj propraj spertoj en mia lando ne estas cenzuristoj. De jaroj mi redaktas Esperanto-gazeteton — ĝis nun neniam iu kontrolis miajn tekstojn! Se oni provus tion, mi tuj forĵetus mian plumon kaj ne skribus eĉ unu vorton.

Pri 4-e: Certe la polaj konstruantoj de la Monda Esepranto-Centro tre volonte ekscius, kiamaniere oni povas konstrui domon sen elspezi monrimedojn! La verduloj devas esti malkovrintaj tiun sekreton. Mi ja nur povas ĵeti ŝtonojn ne sidanta en domo el vitro, ĉu ne? Do, ili insultas malŝpari monon por la konstruado de tiu domo en Bjalistoko. Sed kiamaniere la verduloj konstruos sian domon en Francio? Tiun metodon certe ne nur mi tre volonte ekscius!

Pri 5-e: Pri la „aĉaj politikaĵoj", menciitaj en la artikolo verdula, mi ne volas juĝi — mi ne vivas en FRG kaj ne tre bone konas la tieajn vivcirkonstancojn, do, mi ne enmiksiĝu! Certe la verdulaj esperantistoj pli bone konas tiujn aĉaĵojn.

Tamen, postrestas kelkaj duboj miaflankaj. Mi tre simpatias kun homoj, kiuj intencas konservi nian mizeran naturon kaj plibonigi la vivcirkonstancojn de la homaro kaj bestaro. Des pli mi ne komprenas, kiel pensantaj homoj povis skribi sur du gazetpaĝojn tiom da duonveroj kaj pretendoj. Celo de la „Asocio de Verduloj Esperantistoj" ja estu — laŭ propraj eldiroj — la kunlaboro de esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la Verda Movado, kaj ankaŭ pera laboro inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado. Mi timas, ke la citaĵoj el la nomita artikolo nur povas rezultigi la tutan kontraŭon, ĉar temas pri senracia propagando kaj — milde dirite — pri argumentado, kiu estus konvena al tre dekstruloj!

Joachim Schulze,
Leipzig (GDR)

EL POPOLA ĈINIO

Ĉin Kajĝi — Valoraj donacoj el Karl-Marx-Stadt

En la ĉinlingva libro „Esperanto-movado en Ĉinio", kompilita de s-ano Hou Ĝiping, troviĝas i. a. la noto: „Post la evento de 18a de septembro 1931 la Hankoa Esperanto-Asocio kontaktis 20 esperantistajn organizojn kaj kune publikigis manifeston por akuzi la japanan imperiismen armeon pro ĝiaj invadaj kruelaĵoj. Tio markis la komencon de la kombino de la ĉina Esperanto-movado kun la naciliberiga movado de la ĉina popolo."

La originalo de „NIA MANIFESTO", pro longtempa milito kaj malkvieto antaŭ la liberiĝo estis nek videbla nek trovebla por la ĉinaj esperantistoj. Jen la originalon nun ni povas rigardi. Longatempe ĝi estis zorge konservita en la arkivo de Rudolf Burmeister, prezidanto de la distrikta estraro Karl-Marx-Stadt de GDREA. Dum la ĉi-jara Printempa Libro-Foiro en Leipzig R. Burmeister, intima amiko de ĉinaj esperantistoj, komisiis ĉinan laborantinon en la foiro, alporti al Pekino la valorajon por donaci ĝin al la Pekina Esperanto Asocio.

La originalo troviĝas en delikata celofana kovrilo kaj posedas sur aparta papero germanlingvan klarigon. Tio signifas, ke niaj esperantistaj amikoj en GDR alte taksas ĉi tiun revolucian kulturajon.

Laŭ memoro de s-ano Tang Ŝjun-an, partopreninta en la agado de la Hankoa Esperanto Asocio antaŭ pli ol 50 jaroj la manuskripton de NIA MANIFESTO, alvokanta al la internacia esperantistaro por haltigi la kruelajojn de japanaj invadintoj, lingve reviziis nia pioniro Hujuz kaj ĝi estis unuanime aprobita de 20 esperantistaj organizoj. NIA MANIFESTO estis eldonita en 8 500 ekzempleroj kaj ekspedita al esperantistaj organizoj kaj individuoj en eŭropaj kaj amerikaj landoj, kaj ankaŭ al tiuj en Japanio kaj Koreo. Post la ekspedo de tiu manifesto ĉinaj esperantistaj organizoj rapide ricevis vastan internacian subtenon. Eĉ multaj japanaj esperantistaj organizoj kaj individuoj esprimis per siaj leteroj kondamnojn pri la kruelaĵoj de la invada armeo de sia propra lando. Same rapide NIA MANIFESTO estis tradukita en diversajn lingvojn kaj aperis en ne-esperantaj gazetoj. Tiel la subteno por la ĉina popolo kaj la kondamno al la japana invado estis internacie pli vaste esprimita.

El la sama fonto la Pekina Esperanto Asocio ricevis donace du aliajn valorajn revoluciajn kulturajojn: numeron de la gazeto Internaciisto kaj ĉinajn E-glumarkojn el la unuaj jaroj de la tria jardeko. En tiu numero de la Internaciisto troviĝas raporto de **3 ĉinaj junkomunistoj.** Ili raportis pri la revolucia batalstato de la Ruĝa Armeo en la centra sovetia regiono de Ĉinio kaj en ĝiaj diversaj aliaj sovetiaj regionoj. La raporto estis unu el multaj raportoj senditaj de la Unio de Ĉinaj Proletariaj Esperantistoj, fondita 1931 en Ŝanhajo. Tiam sub la danĝeraj kondiĉoj de la blanka teroro la Unio publikigis la Esperantan gazeton „Ĉina PEK-Bulteno" kaj en ĝi raportis la batalan staton de la ĉina popolo por liberigo kaj pri la stato de la Ĉina Ruĝa Armeo kaj pri la sovetiaj regionoj.

Sur la E-glumarkoj troviĝas la teksto: PER ESPERANTO POR ĈINA LIBERIGO kaj ĉinlingva teksto „Lernu Esperanton". PER ESPERANTO POR ĈINA LIBERIGO estis devizo elmetita en la Dua Kongreso de Ŝanhaja Esperanto Ligo okazinta je la 10a de septembro 1933 kaj vaste aprobita de ĉinaj esperantistoj tra la tuta lando. Sub la inspiro de la devizo la esperantista movado de Ĉinio disvolviĝadis kune kun la leviĝo de la kontraŭ-japana naci-sava movado.

La valorajoj, donacitaj de la Filio Karl-Marx-Stadt de GDREA al la Pekina Esperanto Asocio estas valoraj revoluciaj kulturajoj. El ili oni povas vidi la batalajn agadojn de niaj ĉinaj pioniraj esperantistoj por al nacia liberigo kaj la aktivan subtenon de diverslandaj esperantistoj al la justa batalo de la ĉina popolo. Tia alta spirito nepre stimulos ĉinajn esperantistojn senĉese antaŭenmarŝi por konstrui en nova historia kondiĉo socialismon kun ĉina karaktero kaj akceli la solidarecon kaj amikecon kun diverslandaj popoloj.

[El: LA MONDO, 8/87, monata organo de Ĉina Esperanto Ligo, p. 13/14 Traduko de ĉinlingva artikolo. Aŭtoro: Ĉin Kajĝi, tradukis: same]

Kiel progresas la Esperanto-movado en la ĉina eduka kampo?

Ekde tiam, kiam la Eduka Ministerio de Ĉinio disdonis al la provincoj, municipoj kaj aŭtonom-regionaj edukaj burooj dokumenton, asertante, ke „Esperanto povas esti instruata kiel nedeviga lernobjekto", pli kaj pli da homoj interesiĝas pri Esperanto. La Ĉina Esperanto-Ligo funkciigis ses porinstruistajn Esperanto-kursojn, kiuj kulturis Esperantajn instruistojn por dekoj da altlernejoj. De 1979 ĝis fino de 1986 62 altaj lernejoj en Ĉinio donis Esperantajn lecionojn. Pli ol 5 000 studentoj lernas Esperanton. Krome iuj mezaj kaj elementaj lernejoj ankaŭ donas Esperantajn lecionojn. La Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj funkciigis 14 Esperanto-kursojn, kaj elbakis pli ol 400 sciencist-esperantistojn por la lando. En Ĉinio sep radiostacioj kaj unu televidstacio funkciigas Esperanto-kurson. Korespondaj Esperanto-lernejoj funkcias en multaj lokoj tra la lando. Lernantoj de Esperanto jam superis kvarcent mil. La provincoj Anhuj kaj Shanxi fondis Esperanto-kolegiojn. Lastjare sep altlernejoj decidis elekti Esperanton kiel duan fremdan lingvon nepre lernatan de tiuj esplor-studentoj, kiuj aspiras magistrecon.

Citajo el „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" nr-o 3/1987, p. 42

Pri natura lingvofluo

Fojfoje oni aŭdas ĉe germanoj, parte eĉ ĉe relative spertaj esperantistoj, strangan prononcmanieron. Dum parolado ili dishakas la vortojn laŭ vortfaraj elementoj. Tio aparte koncernas la sufiksojn. Ni do ekz. aŭdas: lern/ejo, urb/estro, bel/eco. Tio estas, simple dirite, nenatura lingvofluo.

Natura parolado, ĉiu ajn silaba lingvo, fluas laŭ **silaba ritmo.** Do — ankaŭ en Esperanto! La ĝusta prononca silabado do estas ler/ne/jo, ur/bes/tro, be/le/co kaj simile.

D. Blanke

EL SOVETA UNIO

Soveta revuo kun Esperanto-rubriko?

En Uzbekio okazis senprecedenca afero: la redakcio de la revuo „Sovetskij Uzbekistan" konsentis havigi al si Esperantan rubrikon. Al la esperantistoj estas disponigita duonpaĝo en ĉiu numero. Se la legantoj- esperantistoj estos aktivaj kaj al la redakcio venados multaj konstruivaj leteroj, la rubriko povas esti pligrandigita, ni pensas sobre, ke ĝi ne tro grandos, sed . . . En la rubriko aperos en Esperanto kurantaj informoj pri la nuntempa kaj antikva Uzbekio, respondoj al la leteroj, leteroj mem de la legantoj (ronda tablo), literaturaĵoj. La unua E-rubriko estos en la kvara (aprila) numero. La unua leciono de Esperanto — en la sesa (junia). La revuo aperas en 12 lingvoj kaj estas emisiata enkaj eksterlanden. La revuo estas tre malkara, la prezo ŝajnas esti simbola. Se oni manifestos intereson al la rubriko, skribos al la redakcio, ni havos eblecon felietone aperigi lernolibron de E-o en 12 lingvoj samtempe (rusa, uzbeka, araba, daria, angla, urdua, germana, hispana k. a.).

La leteroj estu oftaj, interesiĝu pri aboneblecoj de la revuo (aboni tamen eblas ĉe tiu firmao, kiu distribuas sovetiajn presajojn). petu la provekzempleron kun la E-rubriko, demandu pri la vivo en Uzbekio, pri ties loĝantaro, kulturo, industrio, tradicioj k. a. estu proponoj pri la enhavo de la revuo, E-rubriko, oni skribu pri la eblecoj de nia lingvo Esperanto. La redaktoro ne estas esperantisto, kaj ŝajne ne intencas esti tiu, sed al li plaĉas la ideo kaj vervemo de esperantistoj. Ni klopodis certigi lin, ke ili interesiĝas pri multo kaj estas socie aktivaj homoj, legemaj.

Por varmigi la intereson de la redakcio, de la redaktoro ni petas vin skribi laŭ la adreso: „Sovetskij Uzbekistan", Leninstrato 41, SU-70000 — Taŝkento. Skribu en Esperanto aŭ en unu el la lingvoj de la revuo. Skribante al ni, vi faros grandan aferon.

Uzbekaj esperanistoj

Omaĝo al Brecht en Siberio

Memorkunveno de la esperantista klubo MATENO en Surgut (Okcidenta Siberio) estis dediĉita la 14-an de februaro 1988 al Bertolt Brecht, kies 90-jara naskiĝa datreveno fariĝis konvena kaj inda kaŭzo por pli emfaza konatiĝo kun liaj vivovojo, estetikaj konceptoj, literatura verkaro kaj teatra agado. La fenomeno de Brecht speciale reliefiĝas nuntempe surfone de la aktualaj tuthomaraj problemoj, kiam la situacio postulas aktivan personan sintenon kaj engaĝon de ĉiu honesta homo por la socia progreso kaj prevento de nova milito.

Bertolt Brecht estas interesa por ni ne nur kiel granda dramaturgo kaj teatra teoriulo grave kontribuinta al la socialisma kulturo, sed ankaŭ kiel homo kun eksplicita pozicio, kiel homo instruanta al homoj la arton „vivi sur la Tero" kaj dediĉinta sian propran vivon al la servo por la laborista klaso.

La Brecht-celebrado evidentigas grandan atenton al liaj vivo kaj verkaro flanke de la esperantistoj de GDR, kio pruviĝas per pluraj publikigaĵoj en landaj kajeroj de „Paco", per eldono de la „Trigroša romano" ĉe la eldonejo Edition Leipzig, sed, niaopinie, sojle de la baldaŭa centjariĝo de la poeto al la internacia publiko estus bonvena plia libro en Esperanto pri aŭ de Brecht.

Vladimir Opletajev

Geedziga servo!

Kiu interesiĝas pri problemoj kaj labormetodoj de geedzigaj servoj kontaktu V. P. Prjahin, Sovetunio, Minsk-50, a/k. 292, kooperativo pri geedziga servo „Sputnik".

Por sana vivmaniero

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco „Esperanto" kunlabore kun la urba societo por sobreco ĉiujare organizas internacian ekspozicion pri la agado por la sana vivmaniero, mediprotektado, kontraŭ alkoholo, tabako kaj narkotaĵoj en diversaj landoj.

Tiucele ni kolektas **ĉiulingvajn** tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, en la angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezone aŭkaŭ en aliaj lingvoj. Bnovolu sendi ĉion (laŭeble baldaŭ) al:

International Friendship Club „Esperanto"
P.O. Box 16
703000 Samarkand
Uzbekistan USSR

Al ĉiu helponto ni volonte sendos laŭdezirajn memorajojn. Ĉiam validas. Represo kaj **nacilingvaj** anonctradukoj deziratai.

SE VI INTENAS VIZITI LITOVION,
ne forgesu kontaktiĝi kun anoj de la Esperanto-klubo „Juneco" en ĝia ĉefurbo Vilnius! Ili gvidos vin en la urbo, konatigos al vi ĝian historion, nuntempon kaj la Esperanto-movadon, organizos renkontiĝojn kun lokaj esperantistoj. Skribu: EK „Juneco" a. d. 61, 232000 Vilnius, Litovio, USSR. Telefonu: 733075 (ofica) Sigitas Zilionis (prez.); 427029 (ofica) kaj 461748 (hejma) Dalia Bičiunaité; 454110 (ofica) kaj 756024 (hejma) Ruta Vaičiunaité. Bonvenon!

Kunlaboro inter Kievo kaj Leipzig

Pozitivaj impulsoj venas el Kievo, Soveta Unio, por pli profunda kunlaboro kun la esperantistoj en GDR.

Pro la fakto, ke la transformoj en USSR plifaciligis la vojaĝeblecojn de sovetiaj civitanoj, finfine venis 3 delegitoj de la Ukrainia Filio de ASE al Leipzig, por partopreni IFER '88. La vicprezidanto de la Ukrainia Filio de ASE, Evgeni Kovtonjuk, tre vigle traktadis kun la estraranoj de la Distrikta Estraro de GDREA Leipzig pri nova jara protokolo, kiu devus konkretigi la antaŭ jaroj jam interkonsentitan kontrakton pri kunlaboro. La nun interkonsentita protokolo antaŭvidas i. a. interŝanĝon de delegacioj, reciprokan sendadon de informmaterialoj, pliinteresigon de la korespondaj ligoj k. a. Por pli efike subteni porpacajn agadojn la estraroj de la kontraktintoj ellaboros apartajn komunajn agadojn.

Ĉiukaze bona komenco.

„de"

Ekspozicio pri Berlin en Samarkand

Okaze de la 750-jariĝo de la ĉefurbo de GDR, Berlin, la esperantistoj organizis ampleksan ekspozicion en la regiona biblioteko de Samarkand, Soveta Unio.

EL GDR

„Die rationelle Sprache": nova revueto el Halle

Estas fakto, ke la esperantistoj nepre devas plibonigi sian informan agadon en neesperantistaj medioj. Pro tio en kelkaj landoj (ekz. Bulgario, Francio, Italio, Hungario) eldoniĝas nacilingvaj priesperantaj revuoj, respektive revuoj, kiuj ĝenerale traktas la internacian lingvan problemon. Nun ankaŭ aperis simila revueto en GDR. La distrikta estraro de GDREA en Halle eldonadas ekde 1987 modestaspektan sed tre enhavoriĉan germanlingvan revueton kun la titolo „Die rationelle Sprache" (La racia lingvo), kun la subtitolo „novajoj el Halle". La subtitolo, cetere, estis la nomo de la unuaj 4 numeroj de la nova eldonajo (1 — 4/87). Ekde 5/87 ĝi portas la supre menciitan titolon.

En la 8-paĝaj kajeroj, pure presitaj, formato A 5, ni ekzemple trovas jenajn interesajn materialojn, ĉion en la germana lingvo:

1/87:
— Werkstattage der Kultur
— Wozu eine Plansprache?
— UNESCO-Resolution von 1985

2/87:
— Probleme der internationalen Kommunikation und Möglichkeiten zu deren Lösung mit der internationalen Sprache Esperanto (M. Behr)

3/87:
— Vielsprachigkeit — ein Weltproblem. Ungarischer Außenminister über Esperanto
— Esperanto-Weltkongreß
— Aus der Esperanto-Presse
— Fortsetzung des Artikels von M. Behr aus 2/87
5—6/87:
— Rekordkongreß in Warschau
— Schluß des Artikels aus 2/87
1/88:
— Eisenbahner und Esperanto
2/87:
— Schlußdokument von Helsinki (Weltfriedensrat und Esperanto-Weltbund)

Ĉiu kajereto enhavas multege da utilaj informoj el la internacia Esperanto-movado kaj de GDREA. Ne mankas anoncoj pri internaciaj kaj naciaj Esperanto-aranĝoj. La revueto estas aparte bonvena por komencantoj, kiuj ankoraŭ bezonas pli fortan motiviĝon por lerni Esperanton kaj resti en la Esperanto-movado. Sed ankaŭ la ne malgranda grupo de „amikoj de Esperanto", homoj simpatiantaj por la lingvo sed ne povantaj lerni ĝin, trovos la materialon utila. Kaj krome, ĉiu iom interesita esperantisto abonu la revueton, pro la enhavo kaj la necesa solidareco, por ke la nova planteto ne baldaŭ velku!
La abonprezo por la jara serio de 6 numeroj estas 3 markoj. Abonilon postulu de: Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Halle, PSF 161, Halle, 4010.

Elekta komisiono de UEA en Berlin

Dum la 72-a Universala Kongreso la Komitato de UEA elektis sian Elektan Komisionon, kiu havas la taskon prepari la elektojn de la nova prezidanto kaj Estraro de UEA 1989 en Brighton, dum la 74-a UK.
La komisiono, konsistante el la komitatanoj Edward Symoens (Belgio), Petar Todorov (Bulgario) kaj d-ro Detlev Blanke (GDR) kunsidis en ĉeesto de la Generala Direktoro de UEA, Simo Milojeviĉ, la 14-an kaj 15-an de marto 1988 en Berlin.

Ankaŭ nia poŝtmarko konkursis

Ĉiujare filatelistoj de GDR, subtenataj de diversaj gazetoj, faras konkurson pri la plej trafa poŝtmarko, eldonita en la antaŭa jaro. Oni prijuĝas la markojn laŭ du vidpunktoj. Kiu poŝtmarko estas plej konvinka a) pro la socia enhavo bildigita per ĝi? b) pro la grafika prezento ĝenerale? 1987 aperis entute 25 poŝtmarkoj aŭ blokoj. Partoprenis la konkurson 44116 legantoj de 20 periodaĵoj. Do oni diskutis, pripensis, taksis ĉiujn el tiuj 25 eldonaĵoj. Laŭ la kategorio a) la Esperanto-poŝtmarko troviĝis sur la 10-a loko kaj laŭ b) atingis la 15-an lokon.

Grupo de lektoroj fondita

Laŭ rekomendo de la Scienca Konsilantaro pri Fremdlingvoj ĉe la Ministerio pri Altlernejoj kaj Faklernejoj ekde 1988 eblas instrui Esperanton fakultative, se ekzistas la necesaj kondiĉoj (lektoroj, interesitaj studentoj).
Jam ekfunkciis dum la aŭtuna semestro 1987 kursoj en la Pedagogia Altlernejo Magdeburg (gvidas Werner Hocke) kaj en la Teknika Universitato Karl-Marx-Stadt (gvidas Barbara Schroth). Ekde la aŭtuna semestro 1987 aldoniĝis kurso en la Teknika Universitato Magdeburg [gvidas Gerda Häusler] kaj ekde marto '88 la kvara en la Universitato Jena [gvidas Ursula Lufter].
Por ke la instruantaj kaj eventuale instruontaj lektoroj havu konstantan eblecon de spertinterŝanĝo kaj kvalifikiĝu por sia grava tasko, la Centra Estraro de GDREA fondis „Grupon de lektoroj". La grupo kunsidis la 31an de oktobro 1987 en Berlin kaj kunvenis la 12an/13an de februaro 1988 al sia dua aranĝo en Bad Saarow. Dum la unua kunveno estis priparolitaj multaj bazaj problemoj de la instruado de Esperanto sub altlernejaj kondiĉoj. La aranĝo en Bad Saarow havis kvalifikigan karakteron. Oni prezentis prelegojn pri interfero en Esperanto (d-ro Ronald Lötzsch, Gerda Häusler), pri la sciencteknika apliko de Esperanto kaj pri DLT Michael Behr), pri terminologio en Esperanto (Wera Blanke, d-rino Sabine Fiedler) kaj pri la evoluo de la 100-jara planlingvo (d-ro Detlev Blanke).

La literatura sekcio de GDREA en Leipzig ofertos:

— glumarkon „Mi amas Esperanton"
— diversajn poŝtkartojn kun esperantlingvaj aŭ priesperantaj enpresoj
— porokazajn stampojn
— gratulkartojn en Esperanto (okaze de ĝoja evento, kristnasko, internacia virina tago, internacia tago de mondpaco, rememorigilo „skribu baldaŭ" kaj aliaj.

Petu informojn ĉe Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Literatur-Versand, PSF 713, Leipzig 7010.

Ni funebras

— pro la forpaso de la iama LEA-ano Paul Schneider, la 5-an de aprilo 1988
— pro la forpaso de Walter Busse el Magdeburg, la 27-an de februaro 1988. Li estis 89-jara, kaj la plej aĝa membro en Magdeburg, kiu aktivis ĝis sia fino.
— pro la forpaso de Paul Thomas el Auerbach, la 6-an de marto 1988. Li estis iama membro de LEA.
— pro la forpaso de Paul Boden el Pulsnitz, januaro 1988.
— pro la forpaso de Sigrid Engel el Rostock, en la aĝo de 54 jaroj, la 19-an de decembro 1987.

I.C.E.M. — Renkonto 1987

En Poznán renkontiĝis de la 12-a ĝis 22-a de julio 1987 instruistoj, instruantoj kaj instruintoj el dek landoj por diskuti pri edukaj metodoj. ICEM — „Internacia Celado por Edukado Moderna" pritraktis per Esperanto ĉiujn problemojn de la lernado kaj instruado. Ĉeestis nur cent partoprenantoj, tamen, ĉefe pro tiu kaŭzo, la renkonto estis vere fruktodona.
Ni vizitis infanĝardenojn, hejmojn por infanoj malsanaj (kaj korpe kaj mense, kaj dumvive kaj nur mallongtempe), hejmojn por handikapuloj. Kompreneble ni vizitis ankaŭ la ĉirkaŭaĵon, muzeojn (Biskupin, hejmon de Arkadi Fiedler, abelujan muzeon) kaj ankaŭ metiistojn.
Kio estas tiu „Edukado Moderna"?
Tiun ĉi metodon kreis la franco Célestin Freinet. Li estis forte militvundita dum la unua

mondmilito. Li ankaŭ forte amis la infanojn. Pro tio li nepre volis instrui. Freinet ne povis instruadi same kiel aliaj instruistoj, li restis tre malforta pro sia militvundo; lacigis lin longaj paroladoj dum lecionoj. Tial li serĉis novan instrumetodon, por ke militoj ne plu okazu, por ke la infanoj fariĝu pli raciemaj. Li ne volis esti superulo por la infanoj, sed agadi k u n la lernantoj. Li opiniis, ke plej bona labormaniero estas la kunlaboro. Tio signifas, ke ankaŭ la lernantoj fiksas la temojn por la lecionoj. Ne ekzistas fiksita plano por la tuto (unu lernojaro). Se oni volas instrui laŭ metodo, oni fakte devas scii la tutjaran programon kaj ŝanĝi la programerojn laŭ bezono. Poste oni forstrekas la solvitajn problemojn.

En Francio oni ofte uzas tiun metodon en elementa lernejo, parte ĉe lingva studado, ĉe matematiko kaj speciale ĉe libervolaj kursoj. Laŭ sama metodo ankaŭ instruis Korczak, pola instruisto, kiu dum la dua mondmilito instruis judajn infanojn en la „Ghetto". Konataj estas ankaŭ similaj, ekz. la tuttaga edukado de la sovetia pedagogo Makarenko. Ni ofte diskutis pri praktikoj de Freinet-metodo kaj pri komencoj de tiu instruado en Pollando (jam antaŭ 11 jaroj okazis simila renkontiĝo en Plock). Ni eĉ vizitis kurson por la pola lingvo, gvidata laŭ tiu metodo. Entute ni trapasis feriojn, kiuj enhavis riĉan scion pri taŭgaj eblecoj de la edukado kaj instruado.

Evelin kaj Jürgen Berndt

Novaj eldonaĵoj de ĈEA

1. Medalo okaze al la 100-jariĝo de Esperanto laŭ arta propono de Jiři Harcuba, konata ĉeha skulptisto kaj ankaŭ esperantisto, materialo bronzo, diametro 6 cm. Prezo estas en Ĉeĥoslovakio 130,— Kcs, en speciala ujo 140,— Kcs.

2. Broŝuro dediĉita al ĉeha verkisto Karel Čapek aperis kiel speciala represo de la Ĉeĥoslovaka numero de Paco — la jarkolekto 1987. 32 paĝoj, formato A5. El la enhavo: Eseoj pri K. Čapek kaj liaj verkoj, skizaj karakterizajoj de lia verkaro, fragmentoj el 7 diversaj libroj. Prezo 5,— Kcs.

3. Jura vortaro ĉeha-Esperanta de K. Traxler, 138 paĝoj, formato A5, prezo 43,— Kcs. La faka vortaro enhavas proksimume dek mil vortojn kunmetitajn esprimojn kaj frazojn. Ĝis nun la plejampleksa faka vortaro eldonita de ĈEA.

Filmoj en Kastelo

Vojevodina Centro de Kulturo kaj Arto en la Kastelo „Ksiaź" en Wałbrzych informas vin, ke en la periodo 23—25 de septembro 1988 en la Kastelo „Ksiaź" okazos trarigardo de amatoraj filmoj „Pol 8". Ni volus, ke en ĉi tiu trarigardo partoprenu Esperantaj filmoj el diversaj landoj.

Temoj de la filmoj estas libere elektitaj. Povas esti video-filmoj. Se vi volas, ke viaj filmoj partoprenu en ĉi tiu trarigardo, skribu, ni sendos al vi la regulon. La filmojn oni devas sendi ĝis la fino de junio 1988. Laŭ la suba adreso. Se viaj filmoj kvalifikiĝos al la finalo, ni invitos vin, por ke vi povu persone partopreni en la solena disdono de la premioj, kiu okazos en la Kastelo. Skribu al: Esperanto-Sekcio Wojewodzkie Centrum Kultury i sztuki, Zamek Ksiaź, PL-58306 Wałbrzych, ul. Piastów Slaskich 1.

IEKA denove startas!

La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista post sia kunveno dum la Jubilea Kongreso en Varsovio decidis denove pligrandigi informadon pri aŭtomobilistaj aferoj. Multe da esperantistoj-aŭtomobilistoj vojaĝantaj tra la mondo bezonas: la helpon ĉe riparado, informojn pri hoteloj, kampadejoj ktp.

IEKA helpos al vi solvi ĉi-tiujn problemojn pere de siaj landaj reprezentantoj, aŭ IEKA-retoj en multaj landoj. Sed ĉiuj esperantistoj povas helpi al pli granda aktiveco per aliĝo al IEKA. Nun oni preparas la eldonon de aŭtomobilista terminaro, kaj plifortigas kunlaboron kun Monda Turismo kaj aliaj organizajoj.

Por pliaj informoj skribu al s-ro Stanisław Mandrak, str. Kormoranow 39/16, PL-44-144 Gliwice, Pollando.

Pri Esperanto en la gazeto de MPK

„New Perspektives" (‚Novaj Perspektivoj'), oficiala centra gazeto de la Monda Packonsilio, aperigis en sia n-ro 1/88 ampleksan dupaĝan artikolon sub la titolo Centjara datreveno de la kreo de internacia lingvo el la plumo de la pola profesoro Józef Lichten. La verko pritraktas detale la cirkonstancojn de la naskiĝo de Esperanto, ĝiajn eblojn en la internaciaj amikaj kontaktoj, kaj ĝiajn ĉefajn kulturajn kaj sociajn trajtojn. La artikolo aperis rezulte de la kontrakto inter UEA kaj MPK.

11. — 15. 10. 88 en Vraca:
2a Internacia festivalo de la esperantistoj-filmistoj kaj fotistoj

Alta protektanto estos la prezidanto de la bulgaraj filmistoj. Enkadre de la festivalo okazos prezentadoj de Esperanto-filmoj, sonbendoj en Esperanto kaj diapozitivoj, fotoekspozicio, praktikado de filmado kaj fotado, prelegoj pri Esperanto-terminologio en la sfero de la kino- kaj fotoarto. Estas antaŭvidata ankaŭ folklora koncerto, pupteatra spektaklo en Esperanto kaj riĉa ekskursa programo.

Korespondadreso: Esperanto, p. k. 66, BG—3000 Vraca, Bulgario

Stanev, Emilian: Ŝtelisto de Persikoj. Sofia: SOFIA PRESS 1985. 128 pĝ.

La bele presita broŝura libro enhavas du novelojn kaj sep rakontojn de la bulgara prozisto Emilian Stanev (1907—1979).

La titola novelo gvidas nin en la finon de la dua mondmilito. Somersune premata bulgara urbo plena da militkaptitoj. La urbokomandanto, kvindekjara kolonelo, loĝas kun sia edzino sur vinberejo. La „ŝtelisto de persikoj" estas serba militkaptito. La edzino lin renkontas, kiam li kaŝe „rikoltas" sur la vinberejo. Inter la malzorgata virino kaj la malsatanta kaptito estiĝas arda amrilato, kiu finiĝas tragike.

Pli esperplena estas la dua novelo „En kvieta vespero". Ĝi konigas al ni la riskoplenan fuĝon de partizano el faŝisma aresto. Tamen pli min ravis la bestorakontoj. La aventuroj

de grizeblanka lupo kaj de malsatanta vulpo, la saĝeco kaj bonŝanco de leporo kaj la aliaj travivajoj de niaj amikoj de la hejma faŭno donas puran legplezuron. Ili same kiel la noveloj elstaras aparte per preciza prezentado de lando kaj rolantoj, de vivo kaj atmosfero.
La noveloj estiĝis en 1948 kaj tiutempe sendube apartenis al necesega prilaboro kaj supervenko de militaj travivajoj kaj kontribuis al elformiĝo de nova, kontraŭmilita kaj socialisma nacia literaturo. Ĉu ili hodiaŭ, kvardek jarojn post la verkado, ankoraŭ same efikas kaj valoras, ŝajnas al mi dubinde. La naciaj literaturoj delonge progresis kaj respegulas pli multfacetajn kaj profundajn historiajn bildojn. En Esperanto la verko tamen meritas lokon, ĉar tiuspeca literaturo maloftas.
La tradukoj estas plenumitaj de N. Uzunov (Ŝtelisto de Persikoj), P. Todorov (En kvieta vespero) kaj A. Grigorov (sep bestorakontoj). Stilo kaj lingvajo de N. Uzunov estas senteble malpli altaj ol tiuj de la aliaj du tradukintoj.

Michael Lennartz

1988 — 8888 adresoj

La Esperantista societo „Kulturo"-Ruse aranĝas grandan adresaron el la tuta mondo dum la jaro 1988. Ni petas pri sendo de viaj adresoj. Bv. skribi ilin klare. Sendu minimume unu respondkuponon aŭ tri bildkartojn. Adreso: 70000 Ruse, p. k. 208, Esperantista societo „Kulturo", Bulgario

Plaĉa disko el Bulgario

Balkanton eldonis mallongdaŭran diskon kun 2 Esperanto-kantoj. Kantas la ĥoro de instruistinoj-esperantistinoj ĉe la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Pazarĝik. La du plaĉaj kantoj „Ni gardu la pacon" kaj „Patrujo" estas bele registritaj. Informas la eldoninto:

Ĉiu leganto de „der esperantist", kiu sendos al la eldoninto kelkajn bildkartojn de sia loĝloko en bele afrankitaj kovertoj, indaj por ekspozicio, ricevos senpage la diskon. Skribu al: DE de Bulgara Esperantista Asocio, Gurko 3A, 4400 Pazarĝik, Bulgario.

Okaze de la jubileo de Esperanto en 1987 la bulgara poŝto eldonis poŝtmarkon en alta kvanto.

Bulgaraj honorinsignoj

La Centra estraro de Bulgara Esperantista Asocio distingis per Jubilea Ora Medalo „Cent Jarojn Esperanto" la membrojn de la distrikta estraro Potsdam Hanna Scheffs, Brigitte Raabe, Karl Müller pro kontribuo al la Esperanto-movado. Ekde pli ol 10 jaroj ili organizas kaj pliperfektigas la amikan kunlaboron inter la distriktoj Potsdam kaj Ruse. Ni ĝojas pri ĉi tiu honorigo kaj kore gratulas.

Ĥristo Smirnenski: Tra la ventego. Elektita verkaro, tria kompletigita eldono, Sofia-Pres, 1986, diversaj tradukintoj. 144 paĝoj

Kaj tra la sango, tra la larmoj,
tra la terur', obskur' kaj plag'
ektondras ĉien vok' alarma:
„Estiĝu tag'! Estiĝu tag'!"

Jen la kerno de la idearo de Ĥristo Smirnenski, la unua socialisma realisma poeto de Bulgario, kiu en la postmilitaj jaroj 1920-1923 priskribas kaj analizas ĝuste tiujn larmojn de la bulgara popolo, la teruron de milito, de malsato, de malsanoj, je kiuj suferis la mondo de la malriĉaj kaj kaŭzitaj de alia mondo de „kontentuloj". Kaj per ardaj versoj li vokas al la lukto kontraŭ tiu obskuro kiu malhelpas estiĝon de „la tago".
„Du mondoj!", li konkludas en mallonga rakonto: „Unu estas troa!"
Smirnenski ankaŭ prikantas tiujn homojn kiuj fordonis sian vivon por la nova mondo, inter ili Karl Liebknecht kaj Rosa Luxemburg. Li estis fervora defendanto de la ideoj de komunismo. En pluraj poemoj li montras Sovetan Rusion kiel ekzemplon por la internacia proletaro. Smirnenski restas por la bulgara popolo kaj por la mondo la plej elstara bulgara socialisma revolucia poeto, kiu daŭrigis la verkon de Ĥristo Botev, kaj kiu revis pri pli justa socio, kiu nun en lia patrolando estas realo.

Kaj amante l'amasojn sur ter' tie ĉi
kaj kaptite de nova aŭror',
ne sciante pro kio naskiĝis ja mi,
scios kial mi mortu kun glor'!

Ĥristo Smirnenski mortis en 1923, kiam li havis 24 jarojn.
La libro prezentas post necesaj ampleksaj informoj pri vivo kaj verko de Smirnenski kaj post poemo de Ĥristo Radevski „Ĉe la tombo de Ĥristo Smirnenski", 42 poemojn kaj 16 mallongajn rakontojn kaj felietonojn de tiu ĉi juna poeto, kies verko plenrajte jam la trian fojon aperis en la Esperanta traduko.
Kiam en 1931 publikiĝis la unua eldono, la celo estis (laŭ la tiama antaŭparolo) „nur ideon doni pri la verkaro de la plej granda proleta peoto bulgara". Tiun ĉi celon ankaŭ la tria, kompletigita eldono ne simple atingis, sed transpaŝis. Tamen: intertempe la tradukarto pluevoluis, pli klara estas la konscio pri la formo de versajo. Ĉu la „profunda poezia sento" de Smirnenski, kiu „levis la proletan poezion al la alta nivelo de nia nacia literaturo" (el la enkonduko de la fama bulgara profesoro de literaturo Georgi Canev por la tria eldono) ne estus motivo sufiĉa por serioze trarigardi la pli frue tradukitajn poemojn, precipe koncerne la formon? En niaj oreloj doloras kiam ni aŭdas heroan poemon aŭ belan popolan versaĵon — sed kun fuŝaj rimoj (ŝton'-nun, elhakita-senfina, for-dorm',

pezaj-karesas, gigant'-tag', bril'-stri', nebul'-plu, silentas-ĉeno, kaj . . . kaj . . . kaj . . .). Preskaŭ ne estas poemo kiu ne suferus pro tiu erara traduko, kaj bedaŭre estas kelkaj poemoj en kiuj preskaŭ maleblas trovi eĉ nur unu bonan rimon.
Esperanto tutcerte kapablas redoni ankaŭ la profundan kaj belan poeziecon de Smirnenski, kiu fariĝis tiom granda poeto ĝuste pro tio ke li ne supraĵe versigis siajn revoluciajn revojn, sed per sia animo de juna artisto.

Ulrich Becker

ESPERANTO-ĈINA VORTARO, Pekino 1987, 1035 pp.

Sub la ĉefredaktoreco de la elstara ĉina esperantisto Ĝang Hongfan preskaŭ tridek kompilintoj kreis verkon gravegan. La nova Esperanto-ĉina vortaro, ĝustatempe aperinta antaŭ la centjariĝo de la Internacia Lingvo, estas mejloŝtono por la Esperanto-movado en la Popola Respubliko Ĉinio.
La nova leksikografia ellaborajo, volumo pli ol mil paĝojn dika, estas la plej ampleksa, kaj plej kompetente ellaborita vortaro pri Esperanto iam ajn aperinta en la „Lando de la Mezo". Ekde la komenco de la 20-a jarcento, kiam Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion, oni publicis ĉirkaŭ dek vortarojn, sed la plejparto el ili estis destinitaj por komencantoj kaj, krome, estas ne plu troveblaj en la libromerkato.
En la jaro 1959 aperis la poŝformata vortaro Esperanta-ĉina, kompilita de la tiutempa Ĉina Esperanto-Ligo, kaj ĝi ampleksis nurajn 327 malgrandformatajn paĝojn. Tiu ĉi leksikono estis, ĝis nun, la sola referenca libro por la ĉinaj esperantistoj. Evidente ĝi jam delonge ne plu kapablis kontentigi la moderntempajn bezonojn, des pli ĉar la „Plena Vortaro Esperanta-Ĉina", kompilita de s-ro Venlo Fon en la jaro 1943, jam delonge estis kaj malmodiĝinta koncerne la novan leksikon kaj tute ne trovebla en la merkato.
La laŭrojn por verki la nunan „giganton" el inter la ĉinaj vortaroj pri Esperanto nepre meritas s-ro Ĝang Hongfan (konata en Esperantujo ankaŭ kiel Honfan). Li kaj lia diligenta kolegaro, la kompilintoj, plus 12 kontrolintoj kaj unu respondeca provleginto, ekde la jaro 1979 surprenis sur sin la taskon kompili tiun ĉi novan vortaron, kiu estas taŭga ne nur por komencantoj, sed nepre estas moderna gvidlibro por la serioza parolanto kaj uzanto de Esperanto. La artikoloj kolektitaj en la vortaro atingis preskaŭ 46 000, kaj sole la radikvortoj nombras ekzakte 18 296. El tiuj ĉi nombroj klare vidiĝas ke la vorttrezoro de Esperanto ege plimultiĝis spegulante la evoluon kaj evoluigon de la Internacia Lingvo, aparte sur la kampoj de tekniko kaj scienco.
Kio ege valoras por la eŭropa fakulo-leksikologo estas la apendicoj (paĝoj 996 ĝis 1035), en kiuj oni ekscias pri la Esperanta Transskriba Sistemo por la Hanlingva Fonetiko, kiu reprezentas proponon de la ĉefredaktoro mem, kaj — tio aparte gravas — pri ĉinaj geografiaj nomoj. La aranĝo en tiu ĉi toponimia listo estas farita kun zorga scienceco. Krom la ĉinan nomon oni donas la nomon en laŭ — Esperanta prononco kaj inkludas indikojn pri longitudo kaj latitudo kaj, kelkloke, aldonas rimarkojn en iu kvara kolumno. Unu apendico, kiun oni kutime neniam trovas en vortaroj eŭropaj aŭ usonaj, laŭ mia opinio estas aparte bonvena: Konciza Kronologia Tabelo de Ĉina Historio (pp. 1013-1018). Koncize estas markitaj la ĉinaj dinastioj kun la plej gravaj regnoj kaj imperiestroj, donante ankaŭ la daŭron de regado kaj la lokigon de la regno laŭ nuntempaj geografiaj nomoj de provincoj.
La nomoj de naciaj minoritatoj (malplimultoj) de la vasta lando Ĉinio, kun siaj esperantigitaj skrib-variantoj, estas kolektitaj en la apendico „Ĉinaj Nacioj". Tiu ĉi apendico nepre gravas por la sinologo-esperantisto kaj la antropologo.
Ŝajnas, ke la leksikografio ĉina pri Esperanto eklipsis multajn el la eŭropaj Esperanto-nacilingvaj vortaroj. Gratulegon pro tio!

d-ro Erich-Dieter Krause
Karl-Marx-Universitato
Sekcioj pri Aziaj Lingvoj



Le' Psiko (pseŭdonimo): Hunda vivo — kaj aliaj satiroj; Urba estraro Leipzig de GDREA en Kulturligo de GDR; 1987; 44 p.; Esperanto-eldonejo Leipzig.

Hundoj, edukintaj siajn dupiedajn posedantojn — elefanto kiel sandviĉo — afabla ekzekutisto — mortinto, kiu plu kapablas aŭdi tiajn kaj similajn abstraktajn, strangajn, fantaziajn rakontojn prezentas la aŭtoro sur entute nur 35 tekstpaĝoj de la libreto — ofte kun neatendita pinto. Sed ankaŭ ĉiutagajn problemojn li traktas, kiel ekzemple la malbone izolitajn murojn de niaj novaj konstruaĵoj, la malpurigon de la natura medio, iun purigantan, sed neniam ŝoforantan aŭtoposedanton aŭ feriobezonantan, stresitan oficiston.
La aŭtoro sukcesis limigi ĉiun satiron je du paĝoj — escepte de unu — kaj tamen eldiri la esencon . . . kaj la tuton per leĝera, sprita maniero. Kiel konate, la mallonga stilo estas

ja pli malfacila ol la longa. La libreto „Hunda vivo" estas, kiel la aŭtoro deklaris en la postparolo, la unua produkto de lia verkado. Pro tio oni nepre devas gratuli lin kaj esperi, ke li ankaŭ en la estonto havos multajn tiajn ideojn. La unua provo iĝis plezurplena, distra verko.
La aplikado de la lingvo Esperanto estas bonega, precipe kiam oni konsideras, ke la aŭtoro nur relative malfonge konas ĝin. Ĉiu frazo estas fajne ellaborita, kaj tiaj vortfaradoj kiel elefantulo, dupiedulo, enparken, transkapiĝi, lotumado aŭ grizbarbuliĝi montras la ĝojon kaj la konon de la aŭtoro pri vortludoj en Esperanto. Unuvorte: tiu ĉi libreto estas kiel la pipro: malgranda, sed morda kaj bona.
Bone akomoditaj al la tekstoj ankaŭ estas la vinjetoj de Achim Jordan, kiuj tie kaj tie memorigas al la stilo de Wilhelm Busch.
Fine kelkajn rimarkojn pri la aŭtoro mem. La tiel nomata memportreto sur la lasta paĝo de la libreto pli bone konformas al la enhavo ol al la aŭtoro mem kaj pro tio iomete erarigas la leganton. Pri la identeco de la fingropremaĵo mi nenion povas atesti. Vere li — la aŭtoro — estas sufiĉe juna, grizbarba, sed tute ne grizkaraktera, simpatia viro. En dumaniera rilato li similas al la patro de Esperanto:
unue pro la barbo kaj due pro la timo, ke la unua verko povus iĝi fiasko. Lastrilate ambaŭ feliĉe eraris.
Kvankam (aŭ ĉar?) mi konas lin, mi respektas lian deziron pri anonimeco. La scivolema leganto pardonu min.

Manfred Arnold

Kuznetsov S. N. Napravlenija sovremennoj interlingvistiki. — Moskva: Universitato de la amikeco inter la popoloj, 1984. — 100 pĝ.

D-ro S. N. Kuznetsov estas unu el la plej fekundaj nuntempaj interlingvistoj en Sovetio. „Direktoj de la moderna interlingvistiko" estas lia tria interlingvistika libro, kiu venas post „Fundamentoj de interlingvistiko" kaj „Ĉefaj nocioj kaj terminoj de interlingvistiko" (ambaŭ 1982).
La aŭtoro difinas interlingvistikon unuflanke teorio de interlingva komunikado (esplora disciplino) kaj aliflanke teorio de optimumigo de interlingva komunikado pere de planlingvoj (aplika). Tial la ĉefa objekto de la tiel markita aplika disciplino estas planlingvoj. Kvankam Kuznetsov evitas uzi la terminon planlingvistiko, tiu estus ne maltaŭga por etikedi lian laboron, ĉar li nur malofte traktas la mondan lingvosituacion, rolon de tiu aŭ alia etna interlingvo, tamen ankaŭ tiu interlingvistika temaro ne plene ignoratas. Do, la ĉefa objekto estas planlingvoj, pli korekte ok planlingvojn kiujn la moskva doktoro de filologio taksas komunike realigitaj: volapük (1879), esperanto (1887), idiom neutral (1893—98), latino sine flexione (1903), ido (1907—08), occidental (1921—22), novial (1928), interlingua (1951). Tiuj ok estas, laŭ la konsidero de S. N. Kuznetsov, rezulto de la kelk-jarcenta laboro ekde Descartes, kaj la adeptoj de tiu opo formas movadon por internacia planlingvo. Tiu laboro eksperimente pruvis, ke la celata interlingvo devas baziĝi je la principoj de aposterioreco kaj de internacieco.
La menciitaj lingvoj estas analizataj laŭ 3 aspektoj (rilatoj):

a) planlingvoj — etnaj lingvofontoj
b) planlingvoj — komunikado, pensado
c) planlingvoj — kulturo

La unua aspekto jam multfoje estis studata el la **vidpunkto de leksiko kaj morfologio,** ankaŭ de S. N. Kuznetsov (Problemoj en interlingvistiko, 1976): aprioraj, miksitaj, aposterioraj. La aposteriorajn la verkinto klasike dividas je la naturalismaj kaj aŭtonomaj, kaj la lastajn klasifikas en du grupojn: kun aprioraj afiksoj (ido, esperanto) kaj sen aprioraj afiksoj (novial, idiom neutral), aŭ laŭ la terminologio de 1976 hiper- kaj hipokemaj. Sed la **gramatika vidpunkto** ne estas tiom ellaborita. Ne tute klaras la kategorio „gramatika internaciismo". La verba sistemo de la aŭtonomaj aposterioraj (leksike) lingvoj povas esti kaj aposteriora (idiom neutral, novial) kaj apriora (esperanto, ido); samkiel ĉe la naturalisma skolo — la reala gramatiko de latino sine flexione ne havas precedencon en la etnaj lingvoj, do ĝi estas apriora. Kuznetsov konkludas la analizon laŭ la unua el la **vidpunkto de grafiko kaj fonetiko** kaj montras, ke la aŭtonomaj (kaj la projekto de Peano) aplikas la principon „1 litero = 1 sono), dum la naturalismaj strebas al la pli internacia (pozicia) lego de c, t, s, x, g, j. La nunan situacion li opinias nekontentiga, ĉar en ambaŭ kazoj la ortografio ne estas ordigita. La du principoj ne kunigeblas.

La dua aspekto — **planlingvoj kaj pensado** — ricevas en la libro tre detalan prezenton. Tio estas sukceso de l'aŭtoro; la rilato inter la vorto kaj nocio (signanto kaj signato) estas nur sporade studata en planlingvistikaj verkoj. Li reliefigas du ĉefajn direktojn en la lingvoprojektado: logikan kaj empirian. La logika direkto de Descartes kaj Leibniz, tra Schleyer venis al sia maturiĝo ĉe la laboroj de la „Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale" (L. Leau, L. Couturat, W. Ostwald, L. de Beaufront), G. Peano kaj O. Jespersen. La principoj de unusenseco kaj renverseblo, propraj al la logikismo, estas bonaj teorie, sed tre komplike realigeblas en la komunikado. La homa lingvo ne povas funkcii sen homonimoj, sinonimoj, izomeroj (komet-o kaj kom-et-o) kaj aliaj elementoj de la „asimetria dualismo de la lingva signo" (S. Karcevski) — la signanto strebas akiri pliajn funkciojn krom indiki sian rektan signaton, kaj signato strebas manifestiĝi aliel krom tra la signanto. La empiria direkto pruvis la primaran rolon de la uzado, kaj Kuznetsov konvinke klarigas la evoluon de la pozicio de L. Zamenhof, kiu rifuzis kelkajn teoriajn logikismajn postulojn de la projekto en 1887 favore al la komunikaj valoroj.

La kultura aspekto nun multe atentatas speciale inter la e-istoj, tial estas nature, ke la gvidanto de la lingvistika komisiono de ASE ne povis preteri la demandon, sed lia peno nur parte sukcesis. S. N. Kuznetsov montras la relativan junecon de la kulturo en ĉiu planlingvo kompare al la naciaj, mankon de la materia kulturo (scienco, tekniko, komerco, informado . . .) arbitre difinas kiel bazon de la kulturo en la planlingvo la . . . komunajn elementojn ne l' naciaj kulturoj kaj konkludas, ke la evoluinta planlingvo sendependa de la intenco de l'aŭtoroj ricevas funkci-stilan diferencigon.

Tamen ĉi ĉapitre la aŭtoro ne koncernas gravajn problemojn, respondojn al kiuj povus sugesti analizo de la vasta kulturpolitika debato en la e-ista komunumo post la Raŭma manifesto, el studoj de J. Leyk, G. Silfer, V. Benczik. Evidentiĝus, ke la socia bazo de la Esperanta kulturo (ni konsideru esperanton) estas la diaspora komunumo de l'personoj interkomunikiĝantaj per Esperanto, kiu komunumo produktas la propran subkulturon, kiu ne identigendas al la internacia kulturo. Aliaj demandoj: Ĉu vere lernolibraj tekstoj eĉ se rimitaj estas beletro (senfunkcia literaturo)? Kial tradukismo dominas super la originaloj, poezio super prozo kaj dramo, literaturo super teatro kaj kanzono? Kial feblas literatura kritiko? Kiel sin strukturas la komunumo, ĝiaj evolufortoj kaj motoroj, fonaj scioj de la komunumano? Ktp, ktp ... Se oni entreprenas seriozan studon, tiuj demandoj estas ne nur respondeblaj, sed respondendaj. Agnoskante la stil-funkcian diferenciĝon de la evoluinta planlingvo oni agnosku ankaŭ lektiĝon. La esploroj prezentitaj en la Uralaj planlingvistikaj konferencoj pruvas, ke la planlingvo estas ĉiam influata de la sistemoj de pluraj etnolingvoj. Tiu influo manifestiĝas kaj internaciskale (kontribuo) kaj en la skalo de unu etno, kies lingvofonto influas (devio). Ne enirante en la internacian normon tiuj devioj povas ĉe certaj cirkonstancoj (izolo dis la internacia komunuma vivo) generi subsistemon en planlingvo, kompareblan al dialekto de la etna lingvo. „La rusa dialekto" de Esperanto manifestiĝanta en ĉiuj niveloj de Esperanto estas reala fenomeno. S. N. Kuznecov ignoras ĝin, samkiel — dume tro virtualan — ekzistivon de la Esperanta slango.

Eblas imputi kelkajn marĝenajn peketojn:

— Ne estas konsiderita valora teoria laboro de A. Alfandari, Z. Magyar, C. K. Ogden, V. I. Vengerov k. a., kies ideoj kaj lingvoprojektaj principoj montriĝas utilaj, eĉ se ne pruvitaj eksperimente.
— Ekster la atento de Kuznetsov restis nelingvaj kaŭzoj kaj premisoj de sukceso aŭ fiasko de tiu aŭ alia projekto: sociaj, politikaj, financaj, propagandaj cirkonstancoj povas lote domini super la lingvaj kvalitoj kiel akcele (volapük, esperanto, interlingua) tiel bremse (universalglott, omo . . .).
— Mankas funkciaj kaj strukturaj paraleloj al la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, al neinternaciaj planlingvoj.
— La aŭtoro ne vidigas sian koncepton pri la ekzisto de la Esperanta komunumo, ĝia subkulturo, malkonkordoj ... Anstataŭe li kredigas funkciadon de iu internacia movado komuna por adeptaro de la komunikaj planlingvoj. La sociologia terminologio lamas.

Estas kelkaj facile korekteblaj misoj: neo estis lanĉita en 1961, sed ne en 1937, la vorto esperanto estas vir-genra en la rusa lingvo. Sed malgraŭ la supraj rimarkoj mi emfazas, ke la tria libro de S. N. Kuznetsov estas valora kontribuo al la sovetia interlingvistiko. Oni povas bedaŭri, ke ĝi estas ruslingva, kaj la alilingvanoj bezonas tradukon por konatiĝi kun la esploroj de la moskva lingvisto, kaj la mizera eldonkvanto (500 ekz.) igis la volumon bibliografia raraĵo tuj post la apero.

Aleksander KORJENKOV

Canko Murgin: Progresemaj momentoj en la ideologio de L. L. Zamenhof. (Kolekto de studoj) Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985, 66 p.

Dum la lastaj jaroj la bulgaro Canko Murgin publikigis diversajn studojn pri Zamenhof, aparte en la GDR-eldonoj de „Paco", sed ankaŭ en „Bulgara Esperantisto" kaj en la internacia serio de „Paco". Per tiuj studoj li kunhelpas ŝtopi breĉon en la esploroj pri Zamenhof, metante la inicianton de Esperanto en la realan historian fluon kaj analizante lian ideologian pozicion. Ni trovas en la volumo la studon „L. L. Zamenhof pri la internacilingva ideo" (p. 5—10), en kiu Murgin aparte substrekas, ke por Zamenhof Esperanto unuavice estis rimedo por atingi humanismajn celojn. Tre bonvena estas la ampleksa studo „L. L. Zamenhof pri la interna ideo de esperantismo" (p. 11—27), en kiu Murgin analizas la progresemajn kaj anakronismajn trajtojn de la „interna ideo" disvastigante diversajn stadiojn.

En la studo „L. L. Zamenhfo sub la radioj de marksismo-leninismo 1904" (p. 29—32) Murgin laŭ mi nete troigas eventualan influon de la socialisma ideologio je Zamenhof, kvankam tiu ja havis kontakton i. a. kun la revolucia bulgara socialdemokrato Penko Petrov, cetere interesa fakto. Same iom dubindaj estas la interpretoj de Murgin pri internaciismaj flankoj en la ideologio de Zamenhof (L. L. Zamenhof dum la revoluciprepara periodo 1910 — 1914, p. 51 — 56), kvankam tia kuraĝa problemaliro povas heligi iujn poziciojn. Simile kuraĝe Murgin alpaŝas la interpreton de la kvina strofo de „Preĝo sub la Verda Standardo" (p. 33 — 35). Oni ne faru el Zamenhof preskaŭsocialisman revoluciulon. Tio ne necesas! Aliflanke, kiel Murgin prave montras, la humanisma Zamenhof ja volis doni konkretan kontribuon al la „perfektiĝo de la homaro" (p. 37 — 49). La merito de Murgin estas la zorga fontoesploro kaj kuraĝaj interpretoj, eĉ se oni ne nepre akceptas ilin. Utila verko, certe stimulanta pluajn esplorojn pri la iniciatinto de Esperanto.

D. Blanke

Barna, Zoltán: La Laborista Esperanto-movado en Hungario (1913 — 1934). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1986, 184 p.

La doktoriga disertacio de Barna, kiu aperis en la traduko de Imre Szabo en la jaro 1987 (kiel oni povas legi sur la lasta paĝo kaj ne en la jaro 1986, kiel legeblas sur la interna tipolpaĝo) estas grava kontribuo al sistemaj esploroj pri la historio de la parolantaro de Esperanto, kies aparte dinamisma parto estis la laborista. Pri la hungara jam verkis doktorigan disertacion Árpád Rátkai, kiu bedaŭrinde ne aperis en Esperanta traduko. La verko de Barna disdividiĝas en jenaj grandaj ĉapitroj: I. La evoluo de la internacia Esperanto-movado ĝis 1914. II. La elformiĝo de la laborista esperantista movado en Hungario kaj ĝia evoluo ĝis 1915. III. La Esperanto-movado dum la oktobra burĝa demokratia revolucio kaj dum la Konsilantara Respubliko (1918 — 1919). IV. Skiza historio de la laborista esperantista movado inter la du mondmilitoj (1919 — 1939). V. La laborista Esperanto-movado en Hungario dum la jaroj de la ekregado de la kontraŭrevolucio (1919 —

1923). VI. La evoluo de la Hungarlanda Esperantista Societo Laborista inter 1924—1929. VII. La maldekstra opozicia movado en HESL, gvidata de la komunistoj (1924—1930). VIII. La laborista Esperanto-movado en Hungario dum la jaroj de la monda ekonomia krizo (1930 — 1934). Sekvas notoj kaj 7 suplementoj (kun priorganizaj indikoj kaj tabeloj). La tuta libro estas bona elirbazo por pluaj pli profundaj studoj. La disertacio tre (kaj tro) detale respegulas multajn organizajn demandojn kaj konfliktojn sed tute ne sufiĉe prezentas la politikan kaj kulturklerigan agadon de la laboristaj esperantistoj. Pri la internaciaj rilatoj, la politike eduka laboro, konkretaj klasbatalaj agadoj de la hungaraj laboristaj esperantistoj oni ekscias tre malmulton. Barna ankaŭ nesufiĉe uzis internacie alireblajn studojn. Se li legintus la studon de Podkaminer pri la rilato de Lenin al Esperanto (vidu en „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", kiu jam aperis 1978!), li ne povus facilanime reprodukti la mistikan supozon, ke E. K. Drezen apartenis al la „rektaj kunlaborantoj de Lenin" (p. 41). La informoj pri la internacia laborista Esperanto-movado ofte estas tre suprajaj kaj mankhavaj. Ekz. pri IPE oni ne ekscias adekvantajn faktojn. Mankas la indiko, ke IPE fondiĝis en Berlin. Ne ĝustas, ke ĝia centro post la faŝismiĝo de Germanio, de 1933 ĝis 1939 (p. 46 funkciis en Moskvo. IPE havis centron en Moskvo nur ĝis 1934 kaj poste transiris ĝis 1938 al Amsterdam, kaj ĝis 1939 la centro estis en Londono. Ankaŭ valorus mencii, ke la hungara komunista laborista esperantisto Jozef Bata estis unu el la kunfondintoj de IPE kaj aktivadis longe en Berlin. GLEA (= Germana Laborista Esperantista Asocio) neniam aliĝis al la aŭstra gazeto „La Socialismo" (p. 137), kiu estis socialdemokrata. Tio koncernis nur la Germanan Socialistan Esperanto-Asocion (SEA), kiu fondiĝis el membroj forlasintaj GLEA-n en la jaro 1930.
Mankas indeksoj pri temoj kaj personoj, kiuj plifaciligus la utiligon de la libro.
Malgraŭ tiuj kritikaj rimarkoj la verko estas salutinda kontribuo al serioza esplorado, kiu ne nur koncernas la historion de esperantista sed ankaŭ de la hungara laborista movadoj.

D. Blanke

Košecký, Stanislav (Red.): Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. IV. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la 6a lingvistika seminario en Nitra, 1986-06-13./15. Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio. 1986, 120 p.

Ni jam atentigis pri la valora agado de slovakaj interlingvistoj kaj esperantologoj en „der esperantist" 4/1986. Interesa fenomeno: Apenaŭ rimarkite de la movado, sen granda bruo, sed sur tre solida bazo estiĝadas interlingvistika agado en Slovakio. Jam oni povas paroli pri certa tradicio, ĝis nun ankoraŭ ligita al la serio de lingvaj seminarioj en Nitra, sed ankaŭ iom post iom ekster tiu serio. Aperadas en slovakaj lingvistikaj kaj popularsciencaj revuoj artikoloj pri interlingvistikaj temoj kaj pri Esperanto, seriozaj kaj ne verdpropagandaj. La ĉefa motoro estas d-ro Stanislav Košecký el Bratislava.
Feliĉe la slovakaj ankaŭ disponas pri eldoneblecoj. Jam aperis 3 volumoj kun la prelegoj de la Nitra-seminarioj. Fine de 1986 aperis la IVa. En la antaŭparolo oni difinas la celon de la eldonajo, nome esti „serioza bazo por sciencorientita argumentado fare de la funkciuloj de la Asocio, de regionaj komitatoj, gvidantoj de kluboj kaj rondetoj, sed ankaŭ fare de ĉiu sperta esperantisto, kiu devas esti ne nur bone informita pri la pasinto kaj nuntempo de Esperanto el vidpunkto sociologia, kultura kaj aplika sed ankaŭ kapabla kompreni kaj koni ĝiajn plej gravajn lingvistikajn ecojn kaj laŭleĝecajn (p. 4), kiel enkonduke skribas A. Lukáč.
En tia atmosfero, kiun kreadas SEA, ja povas evoluadi junaj novaj science kapablaj homoj, kiuj ne devas timi la profesiajn lingvistojn, sed — male eĉ povus kunlabori kun ili. Pri la kontribuoj: Véra Barandovská demandas „ĉu Esperanto latinecas", atentigas pri la vaste konata fakto de la latinideco de multaj projektoj. Kompreneble estas por ŝi facile montri kelkajn latinecajn trajtojn de la Esperanta leksiko. Se ja la deveno de la morfemoj (parte tra la romanaj lingvoJ) estas klara, la semantikaj problemoj estas pli komplikaj. Barandovská skribas, ke la latina estas „morta" (biologisma esprimo) kaj fine de ŝia traktajo, estas konvinkita „ke Esperanto egalas al la latina lingvo en esprimebloj" (p. 12). Ĉu eblas kompari laŭ tio „mortan" lingvon, kiun la aŭtorino (kvankam latinistino) supozeble ne flue parolaplikas pri modernaj temoj, kun la „viva" Esperanto, kiun ŝi, „simpla esperantisto" (p. 12), ja flue kaj bonege regas? Krom tio multaj citoj sen iu ajn sufiĉa fontindiko. Kaj, cetere, kial ne mencii kaj, antaŭ ĉio kreive utiligi studojn pri la sama temo, ekz. de Modrijan. Interesa estas la provo de Aleš Bednařik revui la aktualan situacion pri la pli kaj pli ofte diskutata „reaperado" de la fonemo „ĥ". Bednařik, kiu mem troviĝas sub la influo de la precipe ĉeĥa ĥ-modo (arĥaiĝos ŝhemeco, p. 13) distingas malaperajn kaj multiĝajn tendencojn. La malapera tendenco laŭ li estas nutrata per periferieco de ĥ, stato de fontlingvo, malalta distingivo de ĥ, konsonanta riĉeco de Esperanto. Al la multiĝa tendenco kontribuas aparte la fontolingvoj kun ĥ-fenomeno, el kiuj venas terminoj.
Sed ŝajne, li forgesas mencii, ke la klopodoj, revivigi ĥ venas aparte forte el la rondoj de ĉeĥaj sciencaplikuloj. Ĉiukaze — la studo donas iom pli da bazo por ke la diskutoj pri ĥ restu sobraj. Tro ofte oni aŭdas pri la „logiko de Esperanto", kvazaŭ ĝi ekzistus kiel abstrakta dia kriterio, al kiu nur necesus daŭre reĝustigi Esperanton. Pri tio oni legas aparte en la verkoj de Mimo kaj Šulco (Richard Schulz). Ligita al ĉitio estas la problemo de „facileco" de Esperanto. Pro tio tre bonvenas la studo de Vladimir Gregor „Pri la logiko en la lingvo ĝenerale kaj en Esperanto speciale". Li bone montras, ke logiko ne tiom povas esti la bazo de lingvo, ĉar la homo ne pensas (ĉar ofte emocie) logike, kaj eĉ ne devas esti. Krome ne estas saĝe kontraŭstarigi la „neloqikajn" etnajn lingvoin kontraŭ la „logika" Esperanto. Lige al tiu studo valoras legi tiun de Stanislav Košecký pri la „facileco" de Esperanto el lingvistika vidpunkto. Košecký montras la suprajecon troveblan en la ofta propagando pri la facileco de Esperanto, ĉar abstrakta „facileco" ne estas lingvistika kategorio. Necesas distingi inter unuopaj trajtoj de lingva sistemo, kiu povus formi pli aŭ malpli grandan „faci-

lecon" en lernado (aŭ apliko) de lingvo por homo kun certa scio kaj inteligenteco kompare al difinita lingvo. Erich Spitz bone montras la multajn problemojn en la apliko de la artikolo de Esperanto, ilin ofte komparante kun etnaj lingvoj. Lia studo evidentigas, „ke la problemo de la ekzakta kaj korekta uzado de la artikolo estas granda agadkampo por la esperantistaj lingvistoj, ke montriĝas necesa detala prilaborado kaj pli precizaj reguloj ol la reguloj indikitaj en PAG", (p. 60). Balázs Wacha analizas la lingvan konduton de siaj esperantlingve edukitaj infanoj kaj pliriĉigas la malrapide kreskantan literaturon pri tiu aparta tipo de dulingveco (etnolingva/planlingva), kiu ankaŭ liveras interesajn vidpunktojn pri la ĝenerala lingvistiko kaj psikolingvistiko. La sama aŭtoro krome liveras ampleksan eseon pri tempo kaj aspekto en Esperanto. Jan Werner klopodas distingi inter „signifo" kaj „senco" por la uzo en la terminologio. Por li ŝajne senco estas signifonuanco. Tamen, la distingo inter signifo kaj senco, ja estas akceptebla por la komunuza lingvo, sed ŝajne ne alportas grandan utilon por la terminologio. Almenaŭ la studo ne konvinkis min.

Interesan fonologian (aŭ fonematikan) studon prezentas Jiři Zeman, kiu esploris la bazajn karakterizaĵojn de la fonem-kunigoj en Esperanto. I. a. li montris, ke la fonemo **k** (10,64 %), **m** (8,82 %) kaj **l** (8,32 %) plej ofte staras en la komenco de la vorto. Ĉe la fino plej ofte aperas **s** (16,19 %), **i** (12,66 %) kaj **n** (12,15 %).

Asimilado inter fenomoj, laŭ distribua statistiko de la fonempozicioj nur povas okazi en 0,5 % de ĉiuj kunigoj. La plej frekventaj dufonemaj kunigoj, laŭ la esploro de Zeman, estas **la** (1,35 %), **as** (1,35 %), **en** (1,28 %). La 48an, 49an kaj 50an lokon havas **iu** (0,43 %) et (0,42 %) kaj **se** (0,42 %). Interesa studo. Entute la volumo prezentas tre **valoran** kontribuon al lingvaj teorio kaj praktiko de Esperanto. Ĝi estas samtempe esprimo de saĝa kompreno pri la neceso de kompleksa agado de asocio, en kiu ne manku la interlingvistika/esperantologia komponento. Nur tre malmultaj landaj asocioj komprenis tiun neceson kaj restas en la limoj de praktikisma malforteco.

Detlev Blanke

Tadeusz Ejsmont (Red.): Internacia Lingva Komunikado (Konferencaj materialoj V). Lodzo 1986, 165 p.

Demandoj de la internacia lingva komunikado hodiaŭ pli kaj pli gajnas la intereson de sciencaj rondoj en diversaj landoj. Tion montras vico da naciaj kaj internaciaj aranĝoj, kiuj okupiĝas pri politikaj, ekonomiaj kaj lingvistikaj aspektoj de tiu problemaro, pri demandoj de informado kaj dokumentado, de aŭtomata lingvoprilaborado, pri intensigado de lingvoinstruado, konsiderante ne nur etnajn, sed ankaŭ planlingvojn kiel internaciajn komunikilojn. Unu el tiuj aranĝoj estas la konferenco „Internacia Lingva Komunikado", organizata de la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de la Lodza Universitato, kiu ĉiujare kunigas polajn lingvistojn, informsciencistojn, sociologojn, filozofojn, pedagogojn kaj specialistojn el aliaj scienckampoj por studi problemojn de la internacia lingva komunikado el la plej diversaj vidpunktoj. La referaĵoj (entute 61) ĝis nun aperis pollingve kun resumoj en Esperanto. Estas ĝojige, ke la organizintoj decidis publikigi la kontribuaĵojn de la pasintjara konferenco unuafoje esperantlingve por atingi interlingvistike interesitojn ankaŭ en eksterlando. La volumo enhavas enkondukon de la redaktoro, bibliografion kaj 8 artikolojn dediĉitajn al la konferencaj problemaroj la lingvo universala kaj la tutmonda konscio; la ŝtataj funkcioj kaj problemoj de internacia lingva komunikado; Esperanto — ĉu nur lingvoscienca eksperimento?

K. Krzysztofek klarigas, kiuj kriterioj estas decidaj por ke lingvo povas fariĝi internacia lingvo. Per la ekzemplo de la angla lingvo li montras formojn kaj rezultojn de „lingva imperialismo". La aŭtoro liveras multajn faktojn pri lingvaj problemoj en aziaj kaj afrikaj ŝtatoj kaj diskutas eblecojn de ilia solvado. **T. Ejsmont** substrekas la gravecon de internacia informinterŝanĝo; li rigardas koumnikadon el pedagogia vidpunkto kaj konstatas, ke — same kiel edukado ne eblas en socia vakuo — „en informa vakuo neebla estas ĉiuflanka homa evoluo" (p. 29). Ejsmont difinas homan komunikadon kiel dinamisman sistemon, kiu senĉese ŝanĝiĝas kaj kiu devas esti raciigata de la homoj je naciaj kaj internaciaj dimensioj. La artikolo enhavas larĝan rigardon de komunikado kaj ne estas facile komprenebla. Sed laŭ mia opinio kaj kompreno la aŭtoro kelkfoje transprenas fremdajn konceptojn kaj citaĵojn (ekz. etnolingvistikajn) sen diferencigi kaj klare montri sian konsenton aŭ malaprobon. **K. Jakubowicz** distingas inter komunikado (kiel unuflanka proceso de informado) kaj komuniko (kiel duflanka aŭ multflanka aŭ — direkta proceso). (Temas verŝajne pri la diferenco inter „komunikowanie" kaj „komunikacja" en la pola lingvo; l.m. la terminoj elektitaj en la tradukado — komunikado/komuniko — ne montras tiun diferencon; la paro komunik(ad)o/komunikiĝ(ad)o povus esti pli taŭga.) Jakubowicz donas superrigardon (l.m. tamen iom partian) pri diversaj difinoj de „komunik(ad)o" kaj precipe okupiĝas pri amasa komunikado. Li prezentas radio- kaj televidsistemojn en Nederlando kaj Jugoslavio, kiuj laŭ li plenumas la kondiĉojn de demokratia amaskomunikado. **J. Marevic** priskribas formojn kaj rezultojn de nia nuntempa informlavango. Necesas profunda informselektado, kiu tamen estas malfaciligata aŭ eĉ malhelpata de ekonomiaj kaŭzoj, tempomanko kaj limigita selektadebleco.

Marevic klarnombre montras, ke multaj informoj restas neuzitaj pro la lingva bariero kaj ke la traduko ne povas solvi tiun problemon. Informaj malfacilaĵoj pro multlingveco staras en la centro ankaŭ de la kontribuaĵo „Neceso urĝe solvi problemon de universala lingvo internacia. Opinioj kaj pritaksoj" de **A. M. Suskin.** La aŭtoro prezentas diversajn aspektojn de la „nuntempa babelismo" kaj tiras la du konkludojn: „1. Batalo por la mondpaco, . . ., devas esti samtempe kunordigita kun la batalo por internacia lingvo . . .; . . . al militmalarmiĝo akompanu lingvistika malarmiĝo; 2. ĉefan baron, malpermesante enkonduki paninterlingvon . . . , oni devas rigardi ne nur kiel soci- kaj politikaspektaj kondiĉoj . . ., sed prefere kiel nesufiĉe altaj

niveloj de konscio kaj de filologa matureco de anoj de apartaj nuntempaj socioj ... (p. 86)" Devas okazi scienchumanisma revolucio paralela al la sciencteknika revolucio. **R. Lipnicki** prezentas gvidideojn de sistemo de universala lingvo, kiu aŭ li povas esti nek nacia nek „artefarita lingvo" (ekz. Esperanto), ĉar „ili enhavas la socikulturan imperiismon de apartaj nacioj aŭ iliaj regionaj gruproj" (p. 90). Universala lingvo estus kunmetita el fonemoj konstruitaj per voĉsinteziloj; ĝi devus esti egale facile lernebla por ĉiu homo sur la tero kaj taŭga por kontaktoj inter homo kaj elektronikaj kibernetikaj sistemoj; ĝia konstruado estas tasko de la matematika lingvoscienco. **I. R. Danka** okupiĝas pri la hindoeŭropa karaktero de Esperanto. La aŭtoro montras per ekzemploj en la sfero de leksiko kaj gramatiko, kiel Zamenhof deviis de principoj de hindoeŭropaj lingvoj. Danka apartenas al grupo da lingvistoj, kiuj klopodas rekonstrui hindoeŭropan lingvon; li fine de la artikolo prezentas tekstparton en tiu lingvo. En la referaĵo de **J. Szałowski** estas ekzamenitaj faktoroj difinantaj la internacian rolon de lingvoj. La aŭtoro ekkonas la kodigon de lingvo, ĝian normigadon kiel gravan kondiĉon por ĝia plua ekspansio kaj subdividas lingvojn laŭ tiu kriterio en la tri grupojn: nekoditajn, koditajn kaj planajn lingvojn. Substrekinda estas lia profunda historia superrigardo pri la evoluo kaj disvastiĝo de gravaj lingvoj. J. Szałowski finas per prognozado de estonta lingva evoluo rigardante jenajn faktorojn decidaj por la graveco de apartaj lingvoj: la ekonomian kaj demografian potencialojn; la kulturan (speciale edukan) politikon; historiajn tradiciojn; bezonojn de la scienc-teknika revolucio; la „ekspansiecon kaj trans-movemon de la anoj de apartaj socioj"; „internacileĝajn normojn rilate al la egaleco de nacioj, iliaj kulturoj kaj lingvoj kaj protektado de la kultura heredaĵo de la homaro" kaj „unuigajn procesojn, kiuj pli kaj pli forte aperadas en nuntempa mondo" (p. 127)

Tre valora suplemento al la referaĵoj estas la „enkonduka bibliografio al la problemo de la internacia lingva komunikado", kompilita de Halina kaj Tadeusz Ejsmont, kiu inkluzivas ne malpli ol 292 libroformajn publikaĵojn kaj 142 artikolojn en pli ol 12 lingvoj. La nivelo de la tradukoj estas ĝenerale bona, kvankam diferenca en la apartaj artikoloj. Okulfrapa estas la uzado de multaj neologismoj kaj internaciaj prefiksoj sen klarigoj, kio ne ĉiam faciligas la komprenon (ekz.: bisneso, vehikulo, inovacio; metaideologio, kvazimotivo, multiflanka). Bedaŭrinde abundas preseraroj kaj ortografiaj malkorektaĵoj. Por la dezirindaj konferencaj materialoj n-ro VI krome estus avantaĝaj kelkaj informoj pri la aŭtoroj. Resume oni povas diri, ke la publikajo pliriĉigas la interlingvistikan literaturon; mi rekomendas ĝin al ĉiuj interesiĝantaj pri internacia lingva komunikado.

Dr. Sabine Fiedler

Šulco, Rikardo: Sur la vojoj de la Analiza Skolo. Esperantologia esearo. Eldonita de Hermano Bermano. Esperanto-Centro Paderborno. 1987. (279 pp.)

La libro estas dediĉita al la prijuĝo de kelkaj lingvaĵoj en la aplikado de Esperanto, kiuj devigas analizeman esperantologon elpaŝi por savi la fundamentecon de nia lingvo. „Esperanto kiel lingva sistemo ne bezonas plibonigon" (p. 46), asertas la aŭtoro kaj difinas la sencon de la nocio „esperantisto": „Li ne estas tiu, kiu pli aŭ malpli bone parolas la Internacian Lingvon, sed tiu, kiu senrezerve agnoskas la deksesregulan Fundamentan regularon kiel bazon de logika gramatiko." (p. 29)

Per multaj ekzemploj, plejparte el la romano „La familio de Paskalo Dŭarto" (esperantigita de Fernando de Diego), el la „Ĉina Antologio 1919 — 1949" kaj el la „Literatura Manifesto '87, R. Šulco intencas demonstri kaj pruvi tendencon al ĥaosigo, piĝinigo, strangigo de Esperanto flanke de la tradukintoj resp. verkintoj de la supre menciitaj publikajoj.

La plej disvastiĝintaj herezoj kontraŭ la fundamenteco koncernas interalie

— la uzadon de „tiel" anstataŭ „tiom" en kvantrilataj esprimoj (ekz. „Pardonu, ke mi restis tiel longe" anstataŭ „... tiom longe"),
— la aplikon de la sufikso „-iĝ" post transitivaj verbaj radikoj (ekz. „ekscitiĝi" anstataŭ „ekscitatiĝi"),
— la enkonduon de „se — absoluta" (ekz. „se citi nur la poetojn" anstataŭ „se oni citas nur la poetojn"),
— la signifigon de la nedifiniteco per derivajoj de „ajn" (ekz. „pro ajna motivo" anstataŭ „pro iu ajn motivo"),
— la simpligon de „tiu ĉi" per forlasado de la pronomo „tiu" (ekz. „ĉi birdegoj" anstataŭ „tiuj ĉi birdegoj"),
— la neobeemon al la Zamenhofa temposistemo
(ekz. Ĉiuj familianoj jam revenis hejmen. Nun ili sidas en la manĝoĉambro, ... baldaŭ ili tagmanĝos." anstataŭ „... estis revenintaj ... baldaŭ ili estas tagmanĝontaj."),
— la neglekton de la sufikso „-uj" en landnomoj
(ekz. Danio anstataŭ Danujo, Danlando aŭ Dana Markio),
— la kunmeton de adjektiva kaj substantiva radikoj
(ekz. grandsinjoro anstataŭ granda sinjoro aŭ sinjorego),
— la bremsadon de la esperantigo de propraj nomoj laŭ ortografio kaj laŭ elparolo kaj laŭ gramatiko
(ekz. Volfgang von Goethe anstataŭ Volfgango Degojto).

R. Šulco, farante konkludojn el la dekksesa regularo, formulas resumojn, kiuj siavice kvazaŭ reprezentus aldonajn gramatikajn regulojn (ekz. sur la paĝoj 201, 204, 208/209). Li atentigas nin pri la fakto, ke Zamenhof mem en sia Ekzercaro kelkaloke eraris: „Komplete akordigi la logikan aplikon de la baza kodo kun la Zamenhofa lingvouzo ne estas eble ... Nek la Zamenhofa Antaŭparolo, nek la Ekezrcaro povas esti leĝdonaj en Esperanto." (p. 48)

Sed ankaŭ la kritikanto de la lingvouzo de Zamenhof estas devigata aŭ logata submetiĝi al lingvotipaj evolutendencoj, kiuj parte laŭ la modelo de etnaj lingvoj okazas ankaŭ en planita lingvo, kiu servas al interhoma komunikado: Defendante la vorton „vehemente" li skribas, ke „temas do pri subkon-

scia influo el mia preskaŭ vivolonga poliglotismo" (p. 233), prijuĝante neologismojn de la tipo „olda" li cedas al la poezio („Kiu amas poezion, ne grumblos, kiam li okaze trovas malkutiman vorton, eble eĉ ĝuos ĝin"/ p. 81), principe kontraŭante al vortkunmetajoj de la tipo ĉirkaŭurbo" li saĝe konsilas, „same kiel la vivo, ankaŭ la lingvo verŝajne ne estas centprocente raciigebla" (p. 23), klarigante la teorie ĝustajn formojn anstataŭ „blankhara, plenluna" li estas preta al kompromiso („Tamen estas tiu uzo tiom disvastiĝinta en la lingvo, ke estus ekscese pedante kontraŭstari ĝin/p. 199).

Estus salutinde kaj utile, se R. Šulco aparte kaj profunde difinus la nocion „logiko" koncerne lingvajn fenomenojn, ĉar paraleligo de la Fundamento de la Internacia Lingvo kaj de la metra sistemo (pp. 13 — 15) ne sufiĉas por kontentigi la komunikobezonojn de homoj. Evidentiĝis, ke ankaŭ en planita, arte farita lingvo validas ne nur ordonoj, preskriboj kaj reguloj, sed ankaŭ kontraŭdiraj procedoj, ekz. tendenco al pleonasmo kaj tendenco al ekonomio. El tio ĉi ja rezultas la fleksebleco de Esperanto kaj ĝia vivopovo.

La aŭtoro sendube pravas, argumentante, ke iom facile manipulebla lingvo kiel Esperanto bezonas nian plej zorgan pripensadon por konservi ĝiajn nekompareblajn rimedojn de fajnaj distingadoj.

T. Dahlenburg/GDR

Laste aperis

— Fratoj Leonkoro, La, Astrid Lindgren. El la sveda trad. Kerstin Rohdin. Högsby: la tradukinto, 1987. 128 p. 21 cm. Ilus. de Ilon Wikland. ISBN 91-7810-828-4. Unu el la plej lastaj verkoj de la fama infanaŭtoro, humanisma fabelo kaj samtempe streĉa rakonto.

— Graveco de la Fideliĝo, La, Oscar Wilde (1854 — 1900). El la angla trad. William Auld, Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1987. 79 p. 21 cm. Ege sprita triakta komedio, iusence la ĉefverko de sia aŭtoro.

— Historie a spisovatelé, Josef Vondroušek. Třebíč: Esperantoklubo de Třebíč, 1984. 44 p. 17 cm. Pri la Someraj Esperantaj Tendaroj en Lanĉov.

— Horizonto de Soveta Litovio, n-ro 10. Vilnius: Litova Filio de ASE, 1987. 68 p. 28 cm. Artikoloj, beletro ktp.

— Idea of a universal language, The, red. Humphrey Tonkin k. Karen Johnson-Weiner. Novjorko: CED, 1986. 128 p. 28 cm. Ringe bind. ISBN 0-934973-05-9. Referaĵoj el la 4a CED-Konferenco, 1985 (dua tago).

— Internacia lingva komunikado. Konferencaj materialoj 6, red. Tadeusz Ejsmont. Lodzo: Studenta Scienca Esperantista Rondo, 1986. 239 p. 24 cm. ISBN 83-7016-205-3. Pollingvaj referaĵoj kun Esperantaj resumoj el la ĉiujaraj konferencoj (la 8a en 1986).

— Kelkaj floroj Esperantaj, serio 2, n-ro 1, A. J. Witteryck. Wilrijk: Eldonejo Sonorilo, 1987. 24 p. 20 cm. Ilus. ISBN 90-71652-08-4. Mucidaj ŝercoj.

— Klang der Fanfare, Der, Johano Strasser. Reinbeck bei Hamburg: Rowohlt Verlag GmbH, 1987. 24 p. 20 cm. ISBN 3-498-06212-3. Moderna romano pri la vivo de 20a-jarcenta esperantisto.

— Lastaj Infanoj de Oldrovalo, La, Gudrun Pausewang. El la germana trad. Joachim Giessner. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 77 p. ISBN 3-922570-44-5. Korŝire realisma romano pri la mondo post nuklea milito.

— Leteroj de E. Lanti. Antaŭparolo de G. Waringhien. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 245 p. 21 cm. Movadhistorie grava represo (el 1940).

— Leksikono Esperanto-Francais-English-Nederlands-Deutsch, Jean P. Bovy. Wilrijk: Eldonejo Sonorilo, 1987 (neindikita). 105 p. 21 cm. Mimeo. ISBN 90-71652-10-6.

— Ludovikologiaj biografietoj, komp. Ludovikito. Kioto: Ludovikito, 1987. 335 p. 22 cm. Ilus. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, kromkajero 3. Zorge fotoreproduktitaj tekstoj pri kaj de la pioniroj: 25 pri Zamenhof mem, 26 pri aliaj.

— Mikronoveloj de Sin 'iti Hosi. El la japana trad. Kikunobu Matuba. Pekino: Pekina Aviada Instituto, 1986. 124 p. 19 cm. Dulingva eldono (Esperanto kaj la ĉina).

— Neologisma glosaro. Eta postrikolto al PIV (2a ampleksigita eld.), Henri Vatré. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 71 p. 21 cm. Jubilea Eldon-serio 2. Esperantologio 4. ISSN 0179-1052. Glosaro de 2000 vortoj ne registritaj en Plena Ilustrita Vortaro, kun fontindikoj.

— Ondro kaj drako, Viktor Dyk (1877 — 1931). El la ĉeha trad. Josef Vondroušek. Třebíč: Esperanto-Klubo de Třebíč, 1986. 46 p. 21 cm. Dramo pri vilaĝanoj kiuj ne scias ĉu kredi je drakoj.

— Overcoming language barriers: The human-machine relationship, red. Humphrey Tonkin k. Karen Johnson-Weiner. Novjorko: CED, 1986. 112 p. 28 cm. ISBN 0-934973-04-0. Referaĵoj el la 4a CED-konferenco, 1985 (unua tago).

— Pandemonio, div. aŭtoroj. Malago: Pandemonio, 1987. 80 p. 21 cm. Dek ok originalaj rakontoj k. a. de ses junaj hispanaj aŭtoroj.

— Pasporta servo 1987 — 1988. Budapeŝto: TEJO, 1987 (ne indikita). 76 p. 19 cm. Mapoj. Kun 796 gastigantoj el 53 landoj.

— Pensoj okaze de la cent-jara jubileo de Esperanto, Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 16 p. 21 cm. Jubilea Eldon-serio 3. Esperantologio 20. ISSN 0179-1052. Prelego ĉe la 42a kongreso de SAT-Amikaro: „oni ne pli longe lasu Esperanton al la ĝisnunaj esperantistoj."

— Plupo en la grandarbaro, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1987. 24 p. 16 cm. Kolorilus. ISBN 91-87320-00-2. Infanrakonto ekologia, ĉarme ilustrita.

— Plupo kaj la ursidoj, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1987. 24 p. 16 cm. Kolorilus. ISBN 91-87320-01-0. Plia ero en la alloga Plupo-serio.

— Poemoj. Julia Pióro. Piastów: la aŭtoro, 1987. 87 p. 21 cm. Bind, Liberversajoj liriketosaj.

— Pokalo el blankdiafana porcelano, La (1954), Takeyama Mitio. El la japana

trad. Zin Kiyosi. Hirosaki: Meros, 1986. 134 p. 26 cm. ISBN 4-87608-036-4. Romano pri inunda detruo de la urbo Ĝulu en la jaro 1109.

— Populara vortareto (dua eld.), A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1986. 104 p. 17 cm. Mimeo. ISBN 950-43-0892-9. Kaprica difinaro, precipe satira-humura.

— Pri kelkaj gravaj problemoj de l' Esperanto-movado, Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 30 p. 21 cm. 90-71205-17-7. Represo de la artikolserio „Fronte al la Jubileo" de la redaktoro de Monato.

— Propedeŭtiko de la klerigoscienco prospektiva, Helma G. Frank. En la ĉinan trad. An Wenzhu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 127 p. 21 cm. Ilus. Dulingva eldono (Esperanto kaj la ĉina, paralelaj tekstoj).

— Ptice i sitnice / Birdoj kaj eroj, Kosta Kuzman. El la serbokroata trad. Boriša Milićević. Novi Sad: la tradukinto, 1987. 45 p. 20 cm. Aforismaj poemetoj (dulingva eldono).

— Rande de l' prudento, Miroslav Krleja (1893 — 1981). El la kroatserba trad. Zlatko Tišljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1987. 240 p. 22 cm. Bind. Romano en pensĉena stilo, amara, socifremda, de grava kroata verkisto.

— Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba, Federico Garcia Lorca (1899—1936). El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrido: Ediciones La Misma, 1987. 229 p, 21 cm. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 23. ISBN 84-86384-03-6. Du el la brilaj dramoj de la fama humanista verkisto.

— Sennacieca Revuo. Paris: SAT, 1986. 56 p. 22 cm. N-ro 114. Diversaj artikoloj, i. a. pri la esperantistoj Pak Hunyung (Koreio) kaj V. J. Erošenko (Ruslando).

— Sentempa simfonio. Poem-antologio hispana, trad. Fernando de Diego. Madrid: Ediciones la Misma, 1987. 154 p. 19 cm. ISBN 84-86384-02-8. Sepdeko da poemoj, celanta prezenti ĝeneralan panoramon de la hispana poezio; kun mallongaj biografietoj.

— Sub la signo de socia muzo, red. William Auld kaj Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 120 p. 21 cm. Ilus. de Georgo Kamaĉo. Serie „Stafeto", n-ro 2. ISBN 90-71205-16-9. Antologio de originala soci-konscia poezio kaj ses eseoj.

— Teoretičeskie osnovij interlingvistiki, S. N. Kuznecov. Moskvo: Izdateljstvo Universiteta Drujbij Narodov, 1987. 207 p. 21 cm. Kun 200-era bibliografio.

— Transiro de ponto, Le Šjaújing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 20 p. 20 cm. Ilus. Amuzaj senvortaj bildrakontoj, taŭgaj kiel instruiloj.

— Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV). El la germana trad. Wilhelm Barnickel. Frankfurto (neindikita): Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1987. 43 p. 21 cm.

— Varmas en Romo, Corrado Tavanti. Ĝenevo: Kooperativo de Literatura Foiro, 1986. 185 p. 21 cm. Bombatenco atribuiĝas al terorisma organizajo esperantista: tiel naskiĝis ĉi tiu glata, realisma krimromano.

— Venis vespero, Fanya Bergstein. El la hebrea trad. Amri Wandel. Stanford: la tradukinto, 1987. 20 p. 21 cm. Ilus. de Haim Hausman. Simpla rimfabelo por la aĝoj 1 ĝis 4.

— Virinoj en la judismo, La (1982), M. de Goeij. El la nederlanda trad. Kolektivo de Tradukantoj Vlaardingen. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj, 1987. 40 p. 21 cm.

— Vortaj (a)ludoj, Stefan Maul. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 112 p. 21 cm. Mimeo. Diversspecaj verketoj celantaj spriton kaj satiron.

— Zagreb. Historia prezento — gvidlibro. Zagreb: Fervojista Esperanto-Societo Zagreb, 1987. 142 p. 16 cm. Kolor-ilus. Mapo. Biblioteko „Etaj turismaj monografioj" n-ro 66. ISBN 86-7133-045-1.

— Homaranismo; A idéia interna, Délio Pereira de Souza. Rio-de-Janejro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 1983. 90 p. 21 cm. Portugallingva studo pri la interna ideo de Esperanto kaj pri la homaranismo de Zamenhof.

— Homo (1962), Eduardas Mieželaitis (1919). El la litova trad. Petras Čeliauskas. Vilnius: Vaga, 1986. 94 p. 20 cm. Bind. Ĉefverko de renoma popola litova poeto.

— Hura! Ne romano, nur grimaco (1930), Julio Baghy (1891 — 1967). Postparolo de Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986 (2a eld.). 438 p. 19 cm. Bind. ISBN 963 571 167 0. Satira-filozofia socikritika romano kun tre komplika intrigo. Unu el la ĉefverkoj de la Esperanta beletro.

— Interfrigo; Internacia transporta merkato de facile pereemaj varoj — komuna aktiveco de eŭropaj fervovoj en kadro de la societo Interfrigo, Gvozden Srediĉ (1935). Beogrado/Skopje, 1986. 24 p. Ilus. 20 cm.

— Internacia kiso; 25 jaroj de drama sekcio de Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, red. Zlatko Tišljar (1945). Zagrebo: Studenta Esperanto-Klubo, 1985. 34 p. Ilus. 21 cm. Kronologia historio kun listo de la ĝisnuna repertuaro kaj teksto de la teatrajo Stilaj ekzercoj, laŭ la ideo de R. Quernay adaptita de Z. Tišljar.

— Iom pri la mensa sinpreparo, J. Novák kaj I. Špička. Prago: Ĉeha Esperanto-Asocio, 1958. 34 p. 20 cm. Pri sinpreparo antaŭ praktikado de rompumatakoj.

— Kantareto, komp. F. Šlabek kaj G. Srediĉ. Beogrado/Skopje, 1986. 16 p. 20 cm.

— Kibernetiko; Ĉu teorio aŭ praktiko? Budapeŝto: Komputista Grupo de HEA, 1986. 64 p. Ilus. 23 cm. ISSN 0236 8269. ISBN 963 571 153 0. Internacia Komputado 1985 n-ro 4. Artikoloj pri komputiko kaj kibernetiko.

— Journeé d'étude sur l'Espéranto; Actes. Vincennes à Saint-Denis: Institut de Linguistique Appliquée et Didactique des Langues, 1983. 146 p. 20 cm. Aktoj de la Universitato de Parizo VIII pri metodologio, psikopedagogio kaj teknikoj en la instruado de lingvoj.

— Krono de l'sonetoj/Sonetni venec, France Prešeren (1800 — 1849). El la slovena trad. Tone Logar. Klagenfurt: Societo de st. Hermagoro, 1986. 40 p. Ilus. 15 cm. ISBN 3 85013 046 0. Dulingva eldono slovena-

Esperanta, 15 sonetoj de grava slovena poeto.

— Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, komp. Germain Pirlot (1943). Oostende: la kompilinto, 1986 (6a ĝisdatigita eldono). 22 p. 21 cm.

— Oranĝa ombrelo. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 150 p. Ilus. 18 cm. 40 mikronoveloj.

— Pasporta Servo 86/87, komp. B. Wennergren. Roterdamo: TEJO, 1986. 70 p. Mapoj. 21 cm. Listo de gastigantoj de TEJO, kun pli ol 700 adresoj el 53 landoj.

— Plupo kaj la gruoj, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986. 24 p. Ilus. 16 cm. Ĉarma rakonto por infanoj, kun belaj desegnoj pri pejzaĝoj, bestoj kaj plantoj, kaj kun profesia grafika prezento.

— Plupo kaj la lupo. Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986. 24 p. Ilus. 16 cm. Alloge ilustrita verketo, kompreniganta al la infanoj la minacon de la moderna socio kontraŭ la naturo.

— Plupo kaj la maro, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986, 1986. 24 p. Ilus. 16 cm. Infanlibreto kun plaĉaj koloraj bildoj, celanta krei komprenemon pri ekologiaj interrilatoj.

— Sude kaj norde de la Granda Muro. Pekino: Ĉina Esperanto-eldonejo, 1986. 90 p. Ilus. Mapoj. 26 cm. Kolekto da artikoloj kaj koloraj fotoj pri la Granda Muro.

— Sur la vojstreko Ho Chi Minh. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh k. a. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1984. 236 p. 19 cm. Rememoroj pri la fama „vojstreko" dum la vjetnama milito.

— Vortstrukturo en Esperanto, La (1916), René de Saussure (1872 — 1943). Brasilia: Laborgrupo „Antaŭen", 1985. 32 p. 22 cm. Serio „Brazilaj kajeroj" n-ro 4. Reeldono de grava frua esperantologia verko.

— Was nun Esperanto betrifft . . ., Richard Schulz (1906). Gerlingen: Bleicher, 1986. 248 p. 18 cm. ISBN 3 88350 015 1. Eseoj kaj prelegoj de la fama esperantologo kaj verkisto, eldonitaj okaze de la 80a datreveno de lia naskiĝo.

— Word Expert Semantics; An interlingual knowledge-based Approach, B. C. Papegaaij. V. Sadler kaj A. P. M. Witkam. Dordrecht/Riverton: Foris Publications, 1986. 254 p. 24 cm. ISBN 90 6765 261 X. BSO Distributed Language Translation (DLT) n-ro 1. Studoj pri semantiko lige kun maŝina tradukado kaj komputa lingvistiko, kadre de la DLT-projekto.

— Adiaŭ, Kuzko! Oldřich Knichal. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 88 p. 20 cm. ISBN 963-571-173-5. Romano pri la aventura vivo de argentinano, spegulanta la socion de Sud-Ameriko.

— Adolesko, Blazio Vaha (Balázs Wacha). Budapest: Oy Mendoservo AK (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 284 p. 20 cm. ISBN 963-571-172-7. Originala romano aŭtobiografieca, psikologiema.

— Antaŭ la nova jarmilo. Ideoj por la vivo el mondo minacata, div. aŭtoroj, red. Wolfgang Günther. Paderborn: Germana Esperanto-Asocio, 1987. 534 p. 30 cm. ISBN 3-922570-46-1. Giganta, iom ĥaosa kolekto de eseoj k. a., plejparte originalaj.

— Beletraj eseoj, Georgi Miĥalkov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1987. 114 p. 20 cm. Dek eseoj pri la originala Esperanta literaturo.

— Dictionarium museologicum, ĉefred. István Éri kaj Béla Végd. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 55 + 774 p. 24 cm. Bind. ISBN 963-571-174-3. Imponega 20-lingva terminaro por 1632 muzeologiaj nocioj; kun aparta indekso por ĉiu lingvo. La Esperantan sekcion redaktis B. Golden kaj T. Sekelj.

— Dum nokta dejoro, Nevena Nedelĉeva. Budapest: Hungara Esperpanto-Asocio, 1987. 85 p. 20 cm. ISBN 963-571-180-8. Simplaj realismaj rakontoj.

— Esperanto-poetoj de Bulgario, Canko Murgin. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 64 p. 20 cm. Kronologia superrigardo.

— Esperanto — Un mundo, una lengua, Luis Jorge Santos Morales. Bogota: El Centro de Idiomas Winston-Salem 1986, La kompleto inkluzivas lernolibron, 335 p., 22 cm., ilus.; dudirektan poŝvortaron de J. Paluzie-Borell; 6 kasedojn. Taŭga ankaŭ por memlernantoj.

— Fenomenet Esperanto, William Auld. El Esperanto trad. de kolektivo. Oslo: Esperantoforlaget A/S, 1987. 110 p. 21 cm. ISBN 82-90006-06-3. Skizo pri la lingva problemo kaj Esperanto kiel solvo.

— Geologio Internacia; vol. 6, red. R. B. Baratov kaj J. Kavka. Dušanbe: Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR (Doniŝ), 1987. 138 p. 20 cm. Ilus. 13 prigeologiaj artikoloj; kun resumoj en la nacilingvoj de la verkintoj: rusa (latinlitere), ĉeĥa, pola, hungara kaj portugala.

— Gramatika ekzercaro/Nyelvtani gyakorlatok, komp. Zsófia Kóródy-Baross. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 105 p. 28 cm. Akompanaĵo al la lernolibro Espearnto 1 de Szerdahelyi.

— Granda pando vizitas mian hejmon. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 24 p. 18 cm. Kolor-ilus. Infanlibro por aĝo 4 — 8-jara.

— International Language Esperanto, The. 1887 — 1987: Towards the Second Centruy, Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA, 1987. 15 p. 21 cm. Esperanto Documents 39A. ISSN 0165-2575. Eseeto pri la perspektivoj de Esperanto kaj de UEA, plus ĝisdatigitaj informoj.

— Inzicht in examen doen. Utrecht: Algemene Nederlandse Esperanto-Examen Commissie, 1986. 101 p. 21 cm. Ekzemplaro-ekzercaro por ekzamen-kandidatoj.

— Itinero je la nomo de Zamenhof, Wojciech Sabolewski. Bydgoszcz: Centralny Ośrodek Informacji Turystycznej, 1987. 92 p. 20 cm. Mapo Turisma gvidlibro pri lokoj en Polando, kiujn vizitis Zamenhof.

— Jivot, otdaden na svoja narod, ĉefred. Nikola Nikolov. Veliko Târnovo: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 165 p. 22 cm. Referaĵoj el Simpozio dediĉita al la 120-a naskiĝreveno de Ĥristo Popov, bulgara esperantista pioniro (kun Esperantaj resumoj).

— Kantoj de motoroj, Nikola Vapcarov. El la bulgara far div. tradukintoj, komp.

Ĥristo Gorov. Sofio: Sofia-Pres, 1987. 116 p. 23 cm. Romantika-socikonscia poemaro, kun enkonduka eseo de H. Radevski.

— Kazinski venas tro malfrue, Deck Dorval kaj Christian Declerck. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 176 p. 21 cm. ISBN 90-71005-18-5. Krimromano pri provo fari „la perfektan murdon". Kun glosoj de neologismoj kaj dialekta lingvajo laŭ la projekto „Popido" de M. Halvelik.

— Kial leporoj havas mallongan voston?, Šju Gúangju. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 28 p. 18 cm. Kolor-ilus. Porinfana fabelo.

— Koloro, Mikaelo Ternavski, red. Valentin Melnikov. Literatura Skatolo, 1987. 40 p. 19 cm Mimeo. Versoj de poeto konata en la ukraina kaj pola, nun verkanta ankaŭ originale en Esperanto.

— Komputikaj terminoj (Pekoteko-labordokumento), komp. Rüdiger Eichholz. Balieboro: Esperanto Press, 1987. 30 p. 29 cm. Stato ĝis 1987 05 20.

— Kooperantivoj kaj la junularo, La, red. Dimitâr Mutušev kaj Georgi Dolapĉiev. Sofio: Centra Kooperativa Unuiĝo, 1985. 26 p. 20 cm. Paroladoj el la Tria Kooperativa Esperantista Konferenco, Plovdiv 1985.

— Koreaj eseoj, noveloj kaj popolrakontoj, 1932 — 1967, trad. Hajpin Li. Seulo: Korea Esperanto-Asocio/Libera Biblioteko, 1987. 222 p. 22 cm. Kolekto celita kiel bazo de „Korea Antologio".

— Laborista Esperanto-movado en Hungario (1913 — 1934), La, Zoltán Barna. El la hungara trad. Imre Szabó. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 185 p. 20 cm. ISBN 963-571-175-1. Detala studo kun ampleksaj notoj kaj fontindikoj.

— La 15a, marto, 1928, Kobayasi Takizi (1903 — 1933). El la japana trad. Nukina Yositaka. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 1987. 109 p. 18 cm. Romaneto pri la subpremo de la Japana Komunista Partio, kiu markis la fondon de japana revolucia literaturo.

— Language problem in science and the role of the international language Esperanto, The Ouyang Wendao (trad. el Esperanto) kaj Bruce A. Sherwood. Rotterdamo: UEA, 1986. 12 p. 21 cm. Esperanto Documents 38 A. ISSN 0165-2575.

— Longhara fratino, Ding Juĝen. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 36 p. 21 cm. Kolor-ilus. Fe-rakonto popolstila.

— Matematika kaj stokastika terminaro Esperanta, Olav Reiersøl. Oslo. Universitato de Oslo. 1987. 116 p. 30 cm. ISBN 82-553-0628-5. Kun terminologiaj komentoj pri diversaj vortoj.

— Mia verda pado. Eseoj kaj rakontoj. Ĥristo Gorov (1908). Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1986. 182 p. 21 cm. Originala proza verkaro, kun biografiaj notoj kaj enkonduka eseo de G. Miĥalkov.

— Raporto de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio al la 13a partia kongreso. El la bulgara trad. Petko Arnaudov. Sofio: Sofia-Pres, 1986. 138 p. 20 cm.

— Rozo kaj glavo (Antologio), komp. Canko Murgin. Sofio: Sofia-Pres, 1987. 337 p. 23 cm. Originalaj poemoj de bulgaraj esperantistoj; kun enkonduka eseo de Georgi Miĥalkov.

— Sanktuloj de la romia kalendaro, komp. J. E. Olsthoorn. El la nederlanda trad. L. H. Brans. Veghel: la tradukinto, 1987 (neindikita). 160 p. 21 cm. Biografietaro.

— Skizo por racia teorio de vortigado, Félix Garcia Blázquez. Caracas: la aŭtoro, 1987 (sen indikoj). 106 p. 21 cm. Dua ampleksigita eldono. Plia provo trudi logikan skemon al Esperanto.

— Studoj pri la Internacia Lingvo, div. aŭtoroj, red. Michel Dux Goninaz. Gent: AIMAV, 1987. 155 p. 21 cm. Naŭ eseoj interlingvistikaj, en la franca (2), angla (2), germana (1) kaj Esperanto (4).

— Terra, István Nemere (1944 —). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 151 p. 19 cm. ISBN 963-571-197-2. Sciencfikcia romano pri forestonteca reveno de homa esploristo al la tero.

— Tra la ventego, Hristo Smirnenski, kun ampleksa enkonduko de Georgi Canev. El la bulgara far div. tradukintoj, komp. Ivan Keremidĉiev kaj Nikola Aleksiev. Sofio: Sofia-Pers, 1986 (3a kompletigita eld.). 143 p. 23 cm. Poezio kaj prozo de fondinto de la bulgara proleta literaturo.

— Unua rendevuo, La, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, 1985. Trad. diversaj en la tradukista sekcio de la Ukraina Respublika Filio de ASE. 48 p. 20 cm. Mimeo. 31 literaturajoj (skeĉoj, poemoj, prozeroj), tradukitaj el la rusa kaj ukrainia.

— Versoj, Ludmila Jevsejeva (1913 — 1980). Ukraina Respublika Filio de ASE, Tradukista Sekcio, 1987. 60 p. 19 cm. Kolektita poemaro de notinda latva esperantistopoetino.

— Vojaĝimpresoj pri Japanio, Vasja Cvetkova. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 68 + 12 p. 20 cm. Koloraj fotoj. ISBN 963-571-171-9. Priskriboj en simpla stilo de bulgara esperantisto kaj pacmovadano.

— 100 demandoj kun respondoj pri la bulgara virino, trad. N. Aleksiev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1986. 139 p. 20 cm.

— Contribution de l' Association universelle d'espéranto a la paix mondiale, La, Ulrich Lins, Roterdamo: UEA, 1986, 14 p., 21 cm, broŝ. Documents sur l'Esperanto 22F. ISSN 0165-2621.

— Contribution of the Universal Esperanto Association to World Peace, The, Ulrich Lins. Roterdamo: UEA, 1986. 14 p. 21 cm. Broŝ. Esperanto Documents 37A. ISSN 0165-2575.

— Ĉevalsalto, La, Petar Mišković. El la serbokroata trad. Senad Colić. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1986. 88 p. 20 cm. Ilus. Pri la aerinvado al Drvar en 1944.

— Ĉinio marŝas en insekta mondo, Io Chou. Pekino: Eldonejo Ĉina Perspektivo, 1986. 98 p. 19 cm. Mallongaj rakontoj en simpla, klara Esperanto de renoma ĉina entomologo.

— Etiketaj scienc-teknikaj verkoj en Esperanto. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo. 136 p. 19 cm. Ilus. Diverstemaj ĉerpaĵoj el Esperantaj periodaĵoj, kun ĉinlingvaj glosoj.

— Espanja Espanja, Vladimir Čerkez. El la serbokroata trad. Vesna Skaljer-Race, kun antaŭparolo de Bojo Popović. Beogrado: Esperanto-societo „Radomir Klajić". 1986.

36 p. 22 cm. Poemo de fama nacia verkisto honore al la Internaciaj Brigadoj en la hispana milito.
— Esperanta-ĉina vortaro. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo. 1986. 1071 p. 13 cm.
— Esperantlingvaj tradukoj de la Sankta Biblio ekde Zamenhof ĝis la nova Ekumena Biblio, Angelo Duranti. Messkirch: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 1985. 48 p. 21 cm. Mimeo. Broŝ.
— Esperanto en nova framo, Albert Goodheir. Coatbridge (Skotlando): Eldonejo Kardo, 1986. 13 p. 21 cm. Mimeo. Broŝ. Eseo pri la ŝanĝiĝo de mondokonceptoj, premiita en la Belartaj konkursoj 1986.
— Esperanto tarptautiné kalba, Laurynas Skúpas. Vilnius: Mokslas. 1987. 112 p. 17 cm. Superrigardo pri la lingvo kaj movado.
— F. E. L.-kadrokursoj 1982 — 1983, div. aŭtoroj. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1982. 32 p. 21 cm. Mimeo. Broŝ. Konsilaro por movadaj aktivuloj.
— Forgesitaj homoj (1936), Cicio Mar. Chongping: LDE, 1985. 215 p. 19 cm. Reeldono de historie grava kolekto de originalaj rakontoj pri ĉinaj malriĉuloj.
— Kolektitaj Poemoj, L. N. M. Newell. Red. Edwin de Kock, kun antaŭparolo kaj ampleksa biografia posteseo. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1987. 80 p. 21 cm. ISBN 0 9505323 6 3. Definita verkaro de talenta, ofte preteratentata poeto.
— Saluton! Esperanto aŭtodidakte, Audrey Childs-Mee. Roterdamo: UEA, 1987. 194 + 40 p. 21 cm. ISBN 92 9017 036 0. Kvara eldono de la fama lernolibro.
— Sciencaj komunikaĵoj 1986, red. András Lukács Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 88 p. 2 cm. Ilus. ISSN 0133-1027.
— Socipolitika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto. La, Edward Symoens. Roterdamo: UEA, 1986. 40 p. 21 cm. Broŝ. Esperanto-Dokumentoj 23 E. ISSN 0165-2524.
— Sonĝo de Ĝenĝen, Mei Jing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 48 p. 16 x 18 cm. Ilus. Infanrakonto pri aventuroj de trodorlotita knabineto, kun grandaj koloraj bildoj.
— Ŝanĝopunkto, La, Jeremi Gishron. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1987. 38 p. 14 cm. Mimeo. Broŝ. Pensoj pri la koncepto de moninterŝanĝo.
— Urboranda nokto, Attila József (1905 — 1937). Div. tradukintoj; red Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. 1986. 141 p. 20 cm. ISBN 963 571 169 7. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 1. Elektitaj poemoj de la plej granda ĉijarcenta hungara poeto.
— Verda trobadoro: internacia kantaro, red. W. van den Blink kaj B. de Wit. Heemstede: Bond van Arbeiders-Esperantisten FLE. 200 p. 21 cm. ISBN 90 70843 03 X. Tradiciaj kaj modernaj kantoj, i. a. pluraj porpacaj, feministaj kaj socikritikaj, kun muziknotoj kaj amuzaj ilustrajoj.
— Vivo de Bertha von Suttner, Walter Klag. Vieno: la aŭtoro, 1986. 3 p. 30 cm. Biografieto de fama aŭstria pacaktivulo.
— Vocabulario Esperanto-Espagnol (1959), E. Tudela Flores. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio, 1987. 176 p. 21 cm. Represo de unudirekta vortaro.

PhDr-o Andrej Lukáč, CSc., prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio, mortis.
La 5-an de decembro 1987 post longa malsano mortis la prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio, komitatano A de UEA D-ro Andrej Lukáč en la plej aktiva aĝo de 56 jaroj. Li estis esperantisto de la jaro 1949, kaj en la landa asocio li ekagis en la jaro 1970. Li estis sekretario, poste prezidanto de Esperanto-Klubo en Prešov, baldaŭ estis elektita kiel prezidanto de Orientslovakia regiona komitato. De post la jaro 1973 li estis aktiva membro de la Centra Komitato kaj en la jaro 1983 dum la landa Esperanto-Kongreso en Žilina li estis elektita kiel prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio. Sub lia gvidado la asocio kreskis ĉiuflanke. Pligrandiĝis la membrobazo, vigliĝis internacia kunlaboro. Honoron al li

Milan Zvara

WERNER PLATE 75-JARA

La 18-an de septembro 1988 Werner Plate el Rostock fariĝis 75-jara. La jubilelulo, longjara membro de la Centra Estraro de GDREA, nun estas honora prezidanto de la Distrikta Estraro Rostock. Ekde 1968 li estis sekretario kaj poste prezidanto de la Distrikta Estraro, sendube ĉiam ĝia plej grava motoro. Werner Plate akiris internacian rekonon pro sia kontinua kaj faksperta aktivado. Jam kiel junulo li estis membro de LEA kaj kunlaboris kun Rudi Graetz. Ni gratulas kore al nia amiko kaj deziras bonfartan estontecon.

CE GDREA

TRADUK-KONKURSO 1987

En la jaro 1987 okazis la jam tradicia tradukkonkurso de „der ersperantist" sub la signo de la 750-jara jubileo de nia ĉefurbo Berlin. Montriĝis, bedaŭrinde, ke ĉiam malpli da personoj havas intereson pri la konkurso. Ĉifoje partoprenis nur 5 personoj kun 6 kontribuajoj. Ni tre kore dankas al ĉiuj partoprenintoj kaj esperas, ke ili ne bedaŭras la partoprenon, ĉar tiamaniere ili povis montri sian kapablon traduki.
Laŭ la opinio de la ĵurianoj estis la plej bonaj:
1. **Dr. Martin Schüler,** Kleinmachnow
— por „Berlina tono"
2. **Gerhard Hornbogen,** Weimar
— „El berlina kliniko"
3. **Dr. Irmgard Bärenz,** Senftenberg
— por „Heinrich Seidel"
Ni tre kore gratulas al ili kaj deziras multajn sukcesojn ankaŭ estonte en prilingvaj konkursoj.

Dieter Berndt

D-RO MINKWITZ 65-JARA

Ni kore gratulas al d-ro Günter Minkwitz, la prezidanto de la DE Dresden, membro de la Centra Estraro de GDREA, kiu festis la jubileon de sia 65-jara naskiĝtago, la 14-an de majo 1988. La jubileulo akiris grandajn meritojn pro la pluevoluigado de la Esperanto-agado en la distrikto Dresden. La prezidanto de Kulturligo pro tio distingis d-ron Minkwitz per la Johannes-R.-Becher-medalo en oro. Ankaŭ tial nian gratulon.

CE de GDREA

Bulgario

Dez. kor. studentino: Kalinka Georgieva Stojnova, str. Ivan Vazov 38, B ap. 33, **7200 Razgard**
Dez. kor. studento: Svetlan Georgiev Stojanov, str. Ivan Vazov 38, B ap. 33, **7200 Razgard**
Dez. kor. Esperanto--Klubo „Verda steleto", lernejo „Hristo Botev", **7200 Razgard**
Anuška Petrova, ul. Otec Paisij 9, **8000 Burgas,** 22j. studentino, dez. kor. pri historio, teatro, literaturo, problemoj de junaj homoj.
Komencantino, 24j. studentino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, lingvoj: Temenuga Ganćeva, str. Iztok 40-p-60, **6100 Kazanlak**
Espernto-Klubo, PK 61, **5180 Polski Trambeš,** dez. kor. kolektive aŭ individue tutmonde

Ĉeĥoslovakio

Komencanto dez. kor. kun geesp. el GDR: Miroslav Severa, Lukostřelecká 2188, **470 01 Česká Lípa**
Vladimir Pyš 723 00 Martinov ć. 13, **Ostrava,** (14j.), dez. kor. kun esp. el GDR, kol. bk, pm, insignojn, etikedojn, k. a.
22j. studentino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Milena Slavíčková, Komenského sady 388, **394 64 Počátky**
37j. projektisto dez. kor. kun germanaj geesp. pri arkitekturo, fotografado, sporto, naturo, kol. bk: Mirek Brož, Bři, Čapku 2858, **580 01 Havl. Brod**
21j. oficistino dez. kor. pri lingvoj, geografio, vojaĝago, muziko, jogo, literaturo, kol. bk: Jana Tučková, Leninova 26, **690 02 Břeclav**

GDR

Dez. kor. tutmonde:
— Rotraut Asmus, Ernst-Thälmann-Str. 19, **Wusterhausen 1903**
— Emil Timm, Otto-Grotewohl-Str. 3a, **Kyritz 1910**
Junuloj dez. kor. tutmonde:
— Kordula Hassel, Müllerweg 35, **Zarrentin 2824**
— Wenke Oldrop, Hugo-Wenzel-Str. 13, **Schwerin 2760**
— Cornelia Deubler, Gellendiner Weg 23 C, **Anklam 2140**
— Franka Seer, Robert-Koch-Str 13, **Schwerin 2756**
— Antje Schwartz, Diesterwegstr. 5, **Wolgast 2220**
— Jana Panwitz, Alter Landweg 18, **Feldberg 2082**
— Diana Tschauschewa, Gleimstr. 11, **Berlin 1058**
— Sylvia Weber, **Serrahn 2081**
— Liane Kermbach, Eichenweg 5, **Kleinmachnow 1532**
— Nora Görke, Waldhof, **Blumenthal 1921**

Hungario

Balázs, Major, **7030 Paks,** Kornis u. 10, 29j., dez. kor. kun geesp. el GDR pri kulturo, historio, turismo, kol. bk, esperantaĵojn
Nagy, Csaba, **1193 Budapest,** Szigligeti ut. 7.VIII.23, 17j., dez. kor. kun esp. precipe el Berlin
18j. infanflegistino dez. kor. kun gejunuloj tutmonde p. ĉ. t., kol. pk, pm: Vàgner, Csilla, **7632 Pécs,** Hajdu Gy. u. 11
28j. instruisto dez. kor. kun germanaj geesp. pri turismo, muziko, Esperanto: Arpad Korn, 14j. komencanto dez. kor. kun junulinoj el GDR pri Esperanto-movado, turismo, sporto, lingvoj: Berzy Zsolt, **3527 Miskolc,** Augusztus 20 u. 20
László Pálinkás, **1043 Budapest,** Munkásotthon u. 55, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol bk, pm
Ferenc Songrácz, **2330 Dunaharastio,** Szölöhegy u. 30, dez. kor. kun junaj esp-oj el GDR

Pollando

25j. studento dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Mieczyslaw Szydlowski, ul. Ogrodowa 5/4, **65-461 Zielona Gora**
Mariola Strzelecka, **91-074 Łodz,** ul. Pietrusińskiego 31 m 11, dez. kor. kun geesp. el GDR pri turismo, kol. pm
Miroslaw Tomczyk, Górno 76, **26-008 Górno** woj. kieleckie, 22j., dez. kor. tutmonde pri antikva literaturo, arkeologio, filatelio.
Tadeusz Ryguła, ul. Dworcowa 2, **43-200 Pszczyna,** 21j., dez. kor. pri turismo, folkloro, fotoarto, kun gejunuloj.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16